

1973 julio-aŭgusto

66-a jaro

n-ro 811-12 (7-8)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Hamburgo

'74

Vi trovos

en ĉi tiu duobla numero julia-aŭgusta (kies malfruon iom pardonigas, espereble, la fakto, ke ĝi ampleksas du monatojn) vere varian enhavon, kiel decas en sezono, kiam la plimulto el niaj legantoj libertempas. Pro la vario kaj iom nova gusto de tiu ĉi numero ni volonte dankas al nia provizora helpanto redakcia, s-ro Ulrich Lins (F.R. Germanujo). En la septembra numero aperos, kiel kutime, unuavice la raporto pri la Universala Kongreso de Esperanto.

Enhavo

- 121 Helpu nin helpi ilin (Sadler)
- 122 Unua kongreso en Luksemburgo
- 122 Neordinara evento en San Marino
- 122 Bela tago por Dade: Dulingvismo en Usono
- 123 Geografia terminaro turmentas la mondon
- 123 Medicinistoj reaktivis
- 124 Kelkaj principoj de nia planado (Lapenna)
- 125 Ministerio proponas prelegojn
- 125 Utilas silente manifestacii
- 126 Recenzo
- 126 Mirinda dometo (Vizito al la poetino Elvira Lippe)
- 127 Recenzo
- 127 Nekrologoj Chiussi, Nišimura, Degenkamp, Bartosch
- 127 Korekto
- 128 Recenzo
- 128 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
- 129 La araba kaj islama literaturo en Esperanto (Chiussi)
- 130 Nia kongresurbo en 1974 (Bormann)
- 132 En Svislando kreiĝis internacia renkontiĝejo interlingvistika (Carlevaro)
- 134 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 135 TEJO-paĝo
- 136 Komenco bona — ĉio bona
- 137 Esperanto en radio
- 138 Oficiala informilo n-ro 469
- 138 Kalendaro
- 139 Anoncetoj

La kovrilo

Kiam tiu ĉi numero atingas siajn legantojn, la kongresanoj de Beograd jam adiaŭis unu la alian, vokante “Ĝis revido en Hamburgo!”. Kio ilin atendas en la kongresurbo de 1974, tion impresu prilumas la artikolo de d-ro W. Bormann, la prezidanto de LKK, sur paĝoj 130 kaj 131: “Hamburgo ofertas ripozon”. La trankvilan etoson, kiun konservas la havena urbo, ilustras ankaŭ nia kovrila bildo: velboatoj sur Alster kaj, en la fono, la televida turo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910). Ĉefredaktoro: V. Sadler. Inkluzivas la organon de TEJO “La Juna Vivo” (TEJO-paĝo). Aperas monate (escepte de aŭgusto). Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza Afriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld. Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%. Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando. Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA). Telefono: (010) 36 15 39. Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM. Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA. Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando. Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo. Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo. Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio. Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo. Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo. Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando. Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo. Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

HELPU NIN HELPI ILIN

En pluraj landoj de la mondo hodiaŭ regas vigla, eĉ nesatigebla interesiĝo pri lernado de Esperanto. Ĉiutage atingas la Centran Oficejon de UEA en Rotterdam helpopetoj – jen nacilingvaj, jen en malbona, sed komprenebla Esperanto – de komencantoj aŭ komencontoj, kiuj aŭde deziras ellerni kaj utiligi Esperanton. Ili petas unuavice lernolibrojn, legolibrojn, prononco-diskojn, insignojn, afiŝojn kaj ĉiajn materialojn por kursoj. Ofte tiuj komencantoj skribas, ke ili ĵus finis kurson kaj tuj komencos mem instrui en sia lernejo aŭ fabriko. Preskaŭ ĉiam ili demandas, kiel ili povas helpi aŭ kompensi al UEA. Bedaŭrinde, tiu grandega interesiĝo, kiu vere ekburĝonis en la lastaj jaroj – almenaŭ parte dank'al la helpo, kiun povis doni UEA – aperas nuntempe unuavice en kelkaj landoj, el kiuj estas maleble aŭ malfacile pagi monon al Rotterdam. Temas unue pri Kubo, pri Albanujo, Turkujo, sed ankaŭ pri Irako, Hindujo, Madagaskaro, Zairo... En Kolombio kaj Venezuelo ni vidas renaskiĝon de juneca, laborema movado, sed, kvankam principe eblas transpigi el tiuj landoj, ekzistas grandaj diferencoj de vivnivelo, kaj ne ĉiuj *povas* pagi.

Por plia universaligo de UEA

UEA povas helpi. UEA povas importi lernolibrojn el Argentino aŭ Hispanujo kaj ekspedi ilin al Kolombio. UEA povas malmultekoste presi arablingvaj informfoliojn por distribuo en Irako. UEA povas al ĉiuj landoj sendi rektametodajn lernolibrojn kun kelkaj klarigoj nacilingvaj kaj helpi la komencantojn. Iam tiu helpo, kiu nun povas esti nur donaca, certe donos fruktojn por la tutmonda movado. La plej granda parto el la petantoj estas gejunuloj. Ili havas tempon kaj energion por disvastigi Esperanton en siaj landoj. Ili ja ne povas sendi al ni monon, sed ili reprezentas grandan ŝancon doni al Esperanto pli universalan aspekton, pli vastan socian bazon. Kaj tio de si mem donos novan impulson al la movado en la landoj, kie ĝi estas firme establita kaj de kies financaj kontribuoj la organizita movado dependas.

UEA volas doni ĉiun helpon, kiun oni petas. Sed ankaŭ UEA devas de ie aĉeti lernolibrojn, pagi sendokostojn, pagi al presistoj. Plejparte la rimedoj por tiu helpo devas veni el la Propaganda Konto aŭ – en la koncernaj kazoj – el la Fondaĵo Azio-Afriko. Bedaŭrinde, ankaŭ tiuj fontoj ne estas senfundaj. La Propaganda Konto estas nutrata plejparte el la enspezoj de la Universalaj Kongresoj. Ju pli granda la kongreso, des pli da mono venas en la Propagandan Konton,

kiu, krom por tiaj agadoj, estas uzata por subteni la laboron de la Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj ĝian revuon *La Monda Lingvo-Problemo*. En 1972 la Universala Kongreso estis en Usono, kio en si mem estis plia paŝo al universaligo de la movado. Sed la fakto, ke ĝis nun la plej granda parto de la UEA-membraro troviĝas en Eŭropo, signifas, ke la UK en Portland ne povis esti tre granda. Sekve, ĝuste nun, kiam amase alvenas helpopetoj el Kubo, Kolombio kaj aliaj landoj, la financaj rimedoj en la Propaganda Konto, kiuj normale enfluas el la Universala Kongreso, riskas elĉerpiĝi.

Ne nur mono estas bonvena

Tial mi deziras persone (Ĉi tio ne estas ia oficiala aŭ burokrata alvoko) peti helpon, helpon de ĉiu, kiu povas doni ĝin en kiu ajn formo. Plej simple, se vi havas monon por doni, estas sendi ĝin al UEA kun la indiko "Por la Propaganda Konto". Sed ne nur mono estas bonvena. Ni volonte akceptas donacojn de uzitaj (aŭ novaj!) lernolibroj kaj vortaroj de Esperanto, por iu ajn popolo, sed precipe por hispanlingvanoj. (Bonvolu NE sendi malnovajn Esperantogazetojn, ĉar ni disponas sufiĉajn provizojn de aktualaj gazetoj: "Esperanto", "Kontakto" kaj aliaj.) Se vi volas helpi nin teni *daŭran* kontakton kun la novaj esperantistoj en tiaj landoj, pensu pri la Fondaĵo Canuto, kiu ĉijare estas jam elĉerpita, kvankam ankoraŭ multaj volus aliĝi pere de ĝi kaj ricevadi la jarlibron kaj revuon.

La entuziasmo kaj dankemo de la novaj lernantoj en la landoj menciitaj estas unu el la plej valoraj rekompencoj por ni, kiuj laboras en la Centra Oficejo de UEA. La leteroj ĉiutage ricevataj donas al ni kuraĝon kaj novan laboremon.

Helpu nin helpi ilin!

Victor Sadler
Direktoro de la C.O.

Mezlernejanoj en Suda Vjetnamujo lernas kanti en Esperanto. UEA volonte helpas ilin daŭrigi la lernadon de la Internacia Lingvo – sed la monrimedoj por tio riskas elĉerpiĝi . . .





Patro Ciccanti plenumas agrablan servon: transdono de pokalo al Esperanto-belulino.

UNUA KONGRESO EN LUKSEMBURGO

La plej nova landa asocio de UEA, Luksemburga Esperanto-Asocio, organizis, kune kun la belga, franca, germana kaj nederlanda asocioj, la Unuan Eŭropan Esperanto-Kongreson, kiu okazis en junio (9-11) en Luksemburgo, la sidejo de pluraj eŭropaj institucioj. Partoprenis pli ol 450 personoj el preskaŭ ĉiuj landoj de la nun plilarĝigita Eŭropa Komunumo (EK). Ne nur la festparolado de prof. Lapenna pri "Esperanto — solvo por la lingva problemo en Eŭropo", sed ankaŭ la dimanĉa laborkunsido vaste pritraktis la estontan agadon sur la eŭropa kampo. Post la plurhora diskutado estis starigita Eŭropa Centro por la landoj de EK, konsistanta el specialaj komisiitoj de la koncernataj landaj asocioj. Ĝi ĉefe koncentros sian atenton al la membroj de la "eŭropa movado" kaj al eŭropaj instruistoj.

Sub la prezido de s-ro Becker, la ĝenerala sekretario de UEA, okazis ankaŭ kunveno de Delegitoj de UEA. Kvindek personoj raportis pri sia helpagado kaj interŝanĝis spertojn.

Skribajn salutojn al la Kongreso sendis la grandduko Jean de Luksemburgo, la ministro de eksterlandaj aferoj de FR Germanujo, Walter Scheel, kaj la prezidanto de la Eŭropa Asocio de Instruistoj.

NEORDINARA EVENTO EN SAN MARINO

Dum la unuaj tri tagoj de junio la liliputa respubliko San Marino estis la scenejo de nekutima kombinita programo. La direkcio de la Esperanto-Centro en Rimini, Italujo, organizis tie nacia kunvenon de la itala Esperanta junularo kadre de siaj celebroy pro la deka datreveno de sia fondiĝo. Samtempe la centro invitis 1 500 italajn pentristojn ekspozicii per po unu verko pri temo libere elektita kaj pri la temo "Esperanto, la dua lingvo por ĉiuj".

Pli ol cent pentristoj reagis je la invito. Iliaj verkoj estis dismontrataj en luksa salono de la Kongresa Palaco en San Marino. Ses pentristoj ricevis unuajn premiojn.

Dum solena danc-vespero f-ino Franca Palano el Mestre, Venecio (vidu la supran foton), antaŭe Esperanto-interpretistino en la Munkena Olimpiko, estis elektita "belulino Esperanto 1973". Memorpokalon transdonis al ŝi patro Ciccanti, la ĉefa organizinto de la manifestacio.

La renkontiĝo de la esperantistoj en San Marino vekis la atenton de miloj da civitanoj kaj turistoj. En la katedralo estis celebrita, por la unua fojo en la historio de la landeto, esperantlingva diservo.

BELA TAGO POR

En Usono, "fandopoto" de enmigrintoj el plej malsamaj nacioj, la scio de la angla lingvo estas la nerezignebla pasporto por la integriĝo de novaj civitanoj en la socion. Kiuj volas avanci kaj transsalti la limojn de la aparteno al grupo izolita per alia lingva kaj nacia deveno, al tiuj ofte restas nur abrupta adaptiĝo al la nova medio — sen la ebleco ekkontakti la fremdan ĉirkaŭaĵon kaj tiel eviti la dolorajn spertojn de ekvivado en nova hejmo, kiun ili ne volas daŭre senti kiel eksterlandon. Amarajn travivaĵojn ankaŭ havis, en la usona ŝtato Florido, enmigrintoj el Kubo, kiuj konsistigas sole en la gubernio Dade proksimume unu kvaronon de la loĝantaro. Sed ili rifuzis submetiĝi al la postulo de la aŭtoritatoj, ke nov-alvenintoj tuj sekvu la lingvan uzon de oficejoj kaj labordonantoj. Kaj ilia protesto havis sukceson — kiel raportis *Los Angeles Times* (1973-05-07), el kiu ni ĉerpis la ĉi-suban artikolon pri eble senprecedenca eksperimento.

*

Dade estis oficiale deklarita dulingva kaj dukultura gubernio, sed neniu estas tute certa, kion ĝi signifas. "Mi vere ne scias," konfesis la guberniestro Jack Orr,

GEOGRAFIA TERMINARO TURMENTAS LA MONDON

Diverseco en la uzado de geografiaj nomoj ne estas nur Esperanta problemo, sed ĝi ŝajnas turmenti ankaŭ la ceteran mondon. Meze de marto ĉi-jara, en la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj, renkontiĝis 32 spertuloj el 20 landoj por diskuti eblecojn de la normigo de la geografiaj nomoj en la naciaj lingvoj. Tio ĉi estis la kvina sesio de la fakula teamo, ĉar UN ek-interesiĝis pri la demando jam en 1960, kiam la fakuloj unuafoje konferencis.

Unu el la konkludoj de la lasta kunveno precizigas, ke al la sesa sesio (en 1975) estos prezentita listo de la landnomoj en la kvin oficialaj lingvoj de UN kaj en la oficialaj lingvoj de la unuopaj ŝtatoj. La marta sesio starigis kvar laborgrupojn, ne nur por normigo de la nomoj sed ankaŭ por normigo de diversaj geografiaj nocioj: ekstertera topografio, mara kaj submara mondoj, geografiaj difinoj kaj sistema latinigo de nomoj origine skribataj per ne-latinaj alfabetoj. Multaj el tiuj demandoj troviĝos en la tagordo de la Tria Konferenco por la Normigo de Geografiaj Nomoj, planata por 1977 junio, verŝajne en Grekujo. Tiu konferenco traktos ankaŭ la ĝisnunajn atingojn en la klopodoj minimumigi la nombron de la t.n. eksonimoj — geografiaj nomoj uzataj en iu lingvo, en speciala formo, por lokoj situantaj ekster la limoj de la lando, kie tiu lingvo estas oficiala.

MEDICINISTOJ REAKTIVAS

Lastatempe komencis reaktivi medicinistoj, uzantaj la Internacian Lingvon. Kvankam dum Universalaj Kongresoj la nombro de partoprenantoj en la faka kunveno de Universala Esperanta Medicina Asocio (UMEA) ne estis alta, la oficiala organo, *Medicina Internacia Revuo*, aperis preskaŭ regule dufoje en la jaro. Redaktas ĝin profesoro Suzuki, fiziologia instituto de Ĉiba, kaj d-ro Ŝinoda, prezidanto de UMEA, Jamagata, ambaŭ en Japanujo. D-ro A. Albault prilaboris la medicinan terminologion por *Plena Ilustrita Vortaro*.

La mankon de pli ofte eldonata, aktuala medicina informilo klopodas forigi ĉeĥoslovakaj kuracistoj, kiuj dum la lastaj kvar jaroj eldonis modestan bultenon, *Medicinistaj Informoj*. Ĝin prizorgas nun Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La bulteno regule aperas la 1an de ĉiu dua monato, kun ampleksa materialo sur 6-8 paĝoj kaj en eldonkvanto de 350 ekzempleroj. La jara abonkotizo estas 20 Kčs aŭ 2 us.dol. Senpagan specimenon sendas Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p.k. 8, CS-120 21 Praha 2, Ĉeĥoslovakujo.

ANKAŬ GERMANA POŝTMARKO

En la marta *Esperanto*, pĝ. 42, ni raportis pri "grava precedenco": la eldono de franca poŝtmarko kun dulingva teksto, kiu memorigas pri la dekjara jubileo de Amikeca Traktato inter Francujo kaj FR Germanujo. Pluraj legantoj atentigis nin, ke la okcident-germana poŝto aperigis simil-aspektan poŝtmarkon — same kun dulingva surskribo.

DADE : Dulingvismo en Usono

kiu devus scii, ĉar la Gubernia Komisiono antaŭnelonge adoptis rezolucion proponitan de li.

"Sed preskaŭ certe ĉiuj strat- kaj oficej-indikiloj estas presotaj en kaj la angla kaj la hispana lingvoj, kaj ĉiuj registraj oficejoj havos dulingvulojn," Orr diris.

"Kaj ni devos havi guberniajn ekzamenojn, ekzemple kvalifikiĝ-ekzamenojn por entreprenistoj, en kaj la angla kaj la hispana," li aldonis.

La rezolucio postulis kreon de fako de dulingvaj kaj dukulturaj aferoj en la ofico de la gubernia administranto por efektivigi la decidon. La gubernia administranto Ray Goode diris, ke li ne estas certa, kiun li nomos al tiu fako, nek precize, kiaj estos ĝiaj devoj. Malgraŭ la necerteco, la grandega latin-amerika komunumo de 300 000 en Miami — el kiuj 90% estas kubanoj — ĝojis pro la decido. Ili konsideris ĝin venko en kampanjo, kiu celas pli bonajn servojn de la loka registaro por hispan-parolantoj.

Laŭdata ago

La ĉefan premon por la rezolucio faris kub-devena bankisto Bernardo Benes, kiu diris al la komisiono: "Hodiaŭ estas bela tago por la gubernio Dade kaj ĝiaj hispanlingvanoj. Vi oficialigas tion, kio estas jam

fakto de la vivo, nome ke la gubernio Dade estas jam dukultura gubernio".


D-rino Carmen Marina, direktoro de la dulingva instituto de la kolegio Biscayne diris, ke multe da kubanoj "konscias ke ĉi tio estas ilia hejmo kaj ili volas partopreni en la komunumo. Sed kiam oni ne parolas la lingvon, oni estas fortranĉita — komplete.

La malmultaj kritikoj esprimitaj venis precipe de privatuloj, kelkaj per anonimaj leteroj al Orr kaj la komisiono. Iuj simpatiantoj de la latinamerika komunumo opinias, ke la rezolucio plue malinstigos kelkajn hispane-parolantojn lerni la anglan.

Miami News raportis antaŭnelonge, ke el la 14 000 dungitoj de la gubernia registaro, 1 207 (8,6%) estas hispane-parolantoj. El la 362 homoj, kiuj sidas en la 26 konsilantaroj de Dade, nur 22 estas de latin-amerika origino, kaj tio inkluzivas la Latin-amerikan Konsilantaron.

El 250 publikaj funkciuloj en la gubernio nur du estas de latin-amerika origino — la portorik-devena urbestro de Miami, Maurice Ferre, kaj membro de la urba komisiono de Miami, Manolo Reboso, kubano. Ambaŭ estas nomitaj, ne elektitaj.

KELKAJ PRINCIPOJ DE NIA PLANADO



Dum la UK en Londono (1971) la Komitato elektis kvinmembran Komisionon sub la gvido de inĝ. Ib Schleicher por ellabori projekton de la Tria Laborplano de UEA. Pro la troa okupiteco de la gvidanto, la Komisiono fakte ne estis kontaktita ĝis la UK en Portland (1972) kaj tial ne povis prezenti al la Komitato konkretan projekton. Aliflanke, la Seminario en Frostavallen, okazinta komence de aŭgusto 1972, pritraktis dum tri kunvenoj, surbaze de la nun valida Dua Laborplano, la celojn kaj taskojn, kiuj devus esti formulitaj en la nova programo de la Asocio. La konkludoj estas entenataj en 8-paĝa Protokolo, sendita poste al ĉiuj komitatanoj. Fine de februaro 1973 la gvidanto de la Londona Komisiono sendis al la Komitato ampleksan proponon pri la nova plano, kun mencio, ke "du membroj de la Komisiono ne havis la okazon partopreni en la fina ellaboro". En la dokumento estas dirite, ke "la tria laborplano validu por periodo de 2 jaroj (1973-75)" kaj ke en tiuj du jaroj okazu "kiel eble plej larĝaj kaj profundaj diskutoj" en ĉiuj niaj organizaĵoj, tiel ke en 1975 la plano povu esti reviziita.

Intertempe en Esperanto-periodaĵoj aperis proponoj de unuopuloj rilate agadojn, kiujn la nova plano devus antaŭvidi. Bedaŭrinde, pro la malebleco publikigi konkretan projekton, tiuj sugestoj okazis en vakuo, ofte sen la necesaj perspektivoj pri la tuto, aŭ kono de jam plenumitaj taskoj, aŭ konsidero de la financaj kaj aliaj eblecoj, resp. limigoj.

En Beograd la Komitato pritraktos la demandon La subaj linioj celas helpi pli bonan orientiĝon kaj de la Komitato kaj de la membraro.

Iom da historio

La unua agadprogramo en la vera senco de la vorto estis farita nur en 1951 okaze de la preparlaboroj por la fondo de CED kun la celo ekfunkciigi ĝin la 1-an de januaro 1952. Laŭ tiu programo CED ankaŭ nun laboras, sed, krome, ĝi regule faras ankaŭ sian ĉiujaran koncizan planon. Komence de 1952 estis ellaborita laborplano por agado en ligo kun la Peticio, kiun la Ĝenerala Konferenco de Unesko estis trak-

tonta fine de tiu jaro dum sia Pariza Sesio. Post la sukceso en Parizo, tuj estis ellaborita nova ampleksa laborplano por taŭge antaŭprepari la agadojn de UEA kaj ĝian reprezentiĝon en la Montevidea Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko (1954). Same kiel la antaŭaj, ankaŭ tiu ĉi laborplano estis ne nur plenumita, sed multilate superita, ĉar dum la realigado mem prezentiĝis aliaj eblecoj, kiujn necesis utiligi.

En 1952 la Estraro por la unua fojo prezentis al la Komitato jaran laborplanon por la agado de la Asocio en 1952-53. Simila unujara plano estis farita por la periodo 1953-54, sed ĝi estis pli ampleksa kaj enhavis ankaŭ erojn pri la eksteraj rilatoj.

Post la spertoj kaj elstare pozitivaj rezultoj de laŭplana laboro en la periodo 1951-54, precipe post la atingoj ĉe Unesko en decembro 1954, maturiĝis la ideo ellabori bazan laborprogramon por pli longa, nedifinita periodo. Rezulte, dum la UK en Bolonjo (1955) estis akceptita la Unua Baza Laborprogramo de UEA samtempe kun la nova Statuto. Ĝia realigo necesigis ellaboron de la Dua Baza Laborplano. Ĝi estis akceptita de la Komitato dum la UK en Kopenhago (1962) kaj estas plu valida, kvankam grandparte jam plenumita.

Ankaŭ post 1955 UEA daŭrigis la sistemon de okazaj planoj. Aldone al la planoj en 1951-54, menciindaj estas la okazaj planoj por la 10-jara datreveno de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj (1958), Zamenhof-Jaro (1958), 15-jara datreveno de la Universala Deklaracio (1963), Jaro de Internacia Kunlaboro (1965), Jaro de Homaj Rajtoj (1968), Internacia Jaro de Edukado (1970), Internacia Jaro de la Libro (1972).

Celoj kaj karaktero

La karakteron de ĉiu unuopa agadprogramo aŭ plano determinas ĝiaj celoj. Tiurilate, du ĉefaj specoj estas distingendaj: la bazaj programoj kaj la okazaj planoj.

La bazaj programoj antaŭvidas agadojn por pli longa, nedifinita periodo, direktitajn al la plenumado de la

celoj de la Asocio laŭ ĝia Statuto. Pro la kunligiteco kaj interdependeco de ĉiuj agadoj, la programoj nece-se enhavas erojn kun konstanta karaktero, kiuj devas esti plenumataj daŭre, ĝis la ĝeneraliĝo de la uzo de Esperanto. Tiaj, ekzemple, estas la eroj rilatantaj al fortikigado de UEA kaj de ĉiuj niaj organizaĵoj; aŭ al plua evoluigado de la lingvoinstruado, k.s. La konstantaj taskoj troviĝis en ambaŭ bazaj laborprogramoj kaj devos enesti ankaŭ en la estontaj. Aliflanke, la bazaj programoj formulas ankaŭ difinitajn konkretajn taskojn, kies realigon oni povas atendi en relative baldaŭa estonteco prenante en konsideron la antaŭajn atingojn, la gradon de organiziteco, la disponeblajn fortojn kaj financajn rimedojn. Ĉar la eblecoj de realigo dependas ankaŭ de eksteraj faktoroj nekontroleblaj, aldone al internaj eventualaj neatenditaj surprizoj, oni ne povas antaŭvidi en la programo precizajn datojn por ĝia plena realigo. Realeca programo de socia-kultura organizaĵo, dependa ĉefe de bonvolo kaj kotizoj, povas nur difini la celojn, indiki la taskojn kaj rimedojn por realigo de la celoj, maksimume kunligi la unuopajn agadojn, sed neniel rajtas precizigi la tempon por realigo.

Diference de la bazaj programoj, la okazaj planoj estas farataj por atingi aktualajn celojn okaze de diversaj eventoj, tempe fiksataj. Al tiu kategorio apartenas ĉiuj ĝisnunaj okazaj laborplanoj de UEA. Ĉar multe pli konkretaj, tiuj planoj povas precize difini la celojn, kutime en formo de minimumaj kaj maksimumaj. Ekzemple, ambaŭ laborplanoj en ligo kun la Peticio enkonduke determinis la maksimumajn kaj minimumajn celojn. En 1952 estis atingita la maksimuma celo; en 1954 la atingo troviĝis meze inter la planitaj maksimumo kaj minimumo.

Komuna trajto de ĉiuj laborprogramoj kaj planoj estas la jenaj kvar esencaj elementoj: celoj, taskoj por realigo de la celoj, homaj fortoj (ekz. organizo de reto da kompetentaj kunlaborantoj), minimumaj financaj rimedoj. Malatento al nur unu el tiuj kvar elementoj signifas anticipan fiaskon. Ĉiuj ĝisnunaj programoj kaj planoj de UEA atentis ilin.

Rilate la proceduron ekzistas malgranda diferenco inter la bazaj programoj kaj okazaj laborplanoj. La du ĝisnunaj bazaj programoj estis faritaj laŭ jenaj stadioj: ellaboro de projekto de la programo; prezento al la Estraro por diskuto, eventualaj amendoj kaj aprobo; publikigo en la organo de la Asocio por ebligi al la tuta membraro komenti en formo de aldonoj, elaso, ŝanĝoj; prezento de la projekto kun la eventualaj amendoj al la Komitato; pritrakto en unu el la komisionoj; fina pritrakto en la Komitato, kaj akcepto. La okazaj planoj estis nur escepte, depende de la graveco, prezentitaj por diskuto al la tuta membraro, sed cetere ankaŭ ili trapasis la saman proceduron, kiel la bazaj programoj. Nur se temis pri tute malgrandaj okazaj laborplanoj, konformaj al la Statuto kaj al la valida baza programo, ili estis pritrakitaj sole de la Estraro.


La koncize prezentitaj principoj kaj proceduroj montriĝis taŭgaj kaj efikaj en la pasinteco. Ŝajnas al mi, ke ili devas esti atentataj ankaŭ en la estonteco por eviti, ke la Asocio restu tro longe sen adekvata laborprogramo, konforma al la aktualaj bezonoj kaj eblecoj.

Ivo Lapenna

Ministerio proponas prelegojn

La Belga Ministerio pri Nederlanda Kulturo nun proponas senpagajn prelegojn pri Esperanto al belgaj lernejoj. Tiel raportis la lasta numero de *Unesco Informatie*, belga gazetara bulteno eldonata de la sama ministerio. La prelegoj estas mendeblaj pere de la ministeria servo pri literaturo kaj dramo, kaj la koncerna preleganto estas d-ro Paul Kempeneers, iama estrarano de UEA kaj aŭtoro de lastatempe eldonita libro *Esperanto-gramatiko*. Kiel lernejojn, kiuj rajtas ricevi la senpagajn prelegojn, la bulteno mencias la lernejojn por instruistoj, tiujn por infanvartistinoj, la "asociiĝintajn" lernejojn de Unesko en Belgujo, la superajn teknikajn lernejojn, superajn lernejojn por arto- kaj muzik-instruo kaj la lernejojn por interpretistoj. Ĉiu lernejo rajtas ricevi unu prelegon pri Esperanto jare.

La sama bulteno *Unesco Informatie* jam de kelkaj monatoj publikigas ankaŭ koncizan kurson de Esperanto.



Utilas silente manifestacii

Skribas J. Brownlee (Britujo):

Rezulte de la manifestacio kiu okazis en Londono en majo okaze de "Konferenco de Eŭropo" en Guildhall, kie estis granda lingva konfuzo inter la mil delegitoj, ŝajnas al mi, ke jen ni havas utilan laboron farendan de agemaj personoj, kiuj volas progresigi Esperanton, ĉie en la mondo, kaj precipe nuntempe en E.E.K. La kosto estos minimuma kaj la efiko granda. Kion fari?

Oni organizu silentajn manifestaciojn — du-tri ĝis dekoj da personoj efikos — ĉiam kaj ĉie okaze de internaciaj vizitoj. Tiaj vizitoj abundas nuntempe en multaj urboj. Vizitoj de ministroj, famaj personoj, sportistoj, danctropoj, ĉe futbalkonkursoj, eĉ turistaj aŭtobusoj, flughavenoj, stacidomoj, konferencejoj, eĉ sur la stratoj.

Oni simple ĉeestu kaj montru anoncojn sur tabuloj aŭ tukoj en la hejma lingvo *kaj en la lingvo(j) de la vizitantoj*: "Ni bezonas komunan lingvon, Esperanto", aŭ simile. Televido eble fotos la manifestaciantojn kaj montros ilin al milionoj — kaj ĵurnaloj raportos.

Altkvalita teksto en brila traduko



Recenzas Simo Milojević (Jugoslavio):

Mahatmo Gandhi, de Huberto Rohden. Tradukis el la portugala Délio Pereira de Souza. Rio de Janeiro: Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro, 1972. 181 p. 19 cm.

Jen dua libro en Esperanto de la konata brazila filozofo (*Imperativoj de la Vivo* aperis en 1963), jen ankaŭ dua libro pri Gandhi en la Internacia Lingvo (*La Vivo de Gandhi* de E. Privat aperis en 1967). Alt-kvalita teksto ricevis taŭgan veston en brila traduko de D. Pereira de Souza. Malgraŭ tio, ke la libro, teknike sukcesa kaj belaspekta, enhavas plurajn preserojn kaj kelkfojan misuzon de prepozicioj, oni restas daŭre kaptita per la flua, belstila traduko de la mal-facila filozofia teksto.

Ne estas por bedaŭri, ke antaŭ ol elĉerpiĝus la libro de Privat pri Gandhi, ni jam havas la duan libron pri la hinda grandulo. Dum la libro de Privat rakontas la vivon de Gandhi en rave simpla stilo kaj maniero, la verko de Rohden klopodas ekspliki la agojn de la Mahatmo, en formo de entuziasma eseo. La libro de Rohden estas necesa kompendio al la verko de Privat. Ĝenas, tamen, ke Huberto Rohden, kies erudicio restas okcidentstila, ne kapablis kompreni kaj klarigi la agojn de Gandhi sen apogo al la Evangelio kaj Jesuo Kristo. Ne sufiĉas nur okaze prinoti tion, sed necesas, ke la Okcidento jam foje ellernu, ke *Bhagavad-Gito* jam estis plurcentjara kiam aperis *La Prediko sur la Monto*. Ne nepre oni bezonas Kriston por kompreni Mahatmon, kaj Rohden lin tiom ofte bezonis, ke oni fojfoje opinias sin esti leganta libron pri Jesuo anstataŭ pri Gandhi.

Tamen, salutinda eldonaĵo, kiun oni apud tiu de Privat nepre havu.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.

Vizito al la poetino Elvira Lippe MIRINDA DOMETO

Nur malmultaj scias, ke en kvieta limkvartalo de konata Baltmara banloko Majori, proksime de la riverbordo de Lielupe, en la de multbranĉaj verdaĵoj ĉirkaŭata dometo loĝas unika virino — Esperanto-poetino kaj Esperanto-ornitologo Elvira Lippe...

Mi decidis ŝin viziti. La ĝardeno enirejo estas riglita. Mi premetas la sonorilbutonon. Aŭdiĝas furioza hunda bojado. Renkonten kuras malgranda hundeto. Tiam venas ankaŭ la mastrino mem kaj revokas la bojanton: "Tumulto, eksilentu!" La hundonomo atentigas min, ĉar en Esperanto ĝi ja signifas konfuzan malordon kaj bruon. Mi provas amikiĝi kun Tumulto — mi donas al ĝi bombonon. La "cerbero" tuj eksilentas, levas siajn antaŭpiedetojn kaj, hurleptante, postulas ankoraŭ — ĝi adoras la bombonojn...

La mastrino afable petas min eniri. Sciante, ke Elvira Lippe posedas multajn sondiskojn kun la enskriboj de birdaj kantoj, mi esprimas la deziron aŭdi la voĉon de najtingalo. Kaj jen, ĉe la sono de najtingalaj triloj, komenciĝas nia konversacio.

Lippe rakontis, ke ŝin tre allogas la ornitologio. Laŭlando de la mondo, sed por tio mankis la kono de fremdlingvoj. Tiam ŝi eksciis, ke ekzistas internacia organizaĵo de ornitologoj-esperantistoj (ORE—Ornitologia Rondo Esperantista), kaj elektis pli rektan vojon: eklerni Esperanton. Nun ŝi jam estas aktivulino de ORE, kunlaboras en ties oficiala organo — la revuo *Mevo*. Iu el la lastaj numeroj de la revuo enhavis ŝian skizon "Kukolo — najtingalo". Ĝi temas pri hejmigita kukolo, kapablanta kanti kiel najtingalo, kluki kiel la kokino kaj eĉ boji kiel la hundo.

Omaĝe al la unua prezidanto de ORE, la itala ornitologo Simondetti, forpasinta en 1968, estis fondita premio je lia nomo, kiun oni aljuĝas por la plej bona priskribo de viva naturo. En la 1969a jaro la unua

laŭreatino de tiu premio fariĝis la svedino Luiza Karlsson.

Elvira posedas riĉajn kolektojn de al la ornitologio dediĉitaj afiŝoj, prospektoj, albumoj kaj libroj, multe da sondiskoj kun la voĉoj de birdoj kaj bestoj, kiujn ŝi volonte reaŭdigas al siaj gastoj. Lippe ankaŭ helpas al lernejoj organizi ekspoziciojn pri la protekto de flugantaj amikoj.

Nia interparolo tuŝas Esperanto-poezion. Lernante Esperanton ŝi sian kursotaskon jam skribis en versoj. Unu el ŝiaj unuaj verketoj — "Fabeleto" — estas lokita en Esperanto-lernolibron, eldonitan en Hungarujo.


Poeziaj verkoj de Lippe kun revoluciema kaj kontraŭmilita enhavo, ĉefe tradukoj en Esperanton, estas presataj en la revuo *Por la Paco*, aperanta en Moskvo. Ankaŭ la eldonejo *Zvaigzne* (Stelo) eldonis la kolekton *Latva poezio* 1945-1966. Preskaŭ ĉiujn verkojn de la kolekto tradukis Lippe. Antaŭnelonge en Moskvo en luksa eldono aperis la revuo *Paco* — la organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM). En tiu revuo estas presita la poemo de Mirdza Kempe "Heroeca rekviemo", dediĉita al la defendantoj de Liepaja, en la traduko de Elvira Lippe. Krom tio ŝi tradukas nun la versaĵkolekton de E. Veveris "Plantu rozojn en la teron malbenitan..."

En la dometo de Lippe la horoj pasis nerimarkite. La hejmon de la Esperanto-poetino mi tamen devis forlasi kaŝe. Tra la ĝardeno elirejo Tumulto neniun ellasas. Tie ne helpas eĉ bombonoj.

J. Gold

El latva ĵurnalo "Padomju Jaunatne" (Sovetunia Junularo) esperantigis E. Dancis.

La plimulton de la poemoj en tiu ĉi antologieto, eldonita en 1968, tradukis Elvira Lippe. Sed krom poezio, ŝin allogas ankaŭ ornitologio.



Nur por muzikamantoj



Recenzas Geoffrey King (Nederlando):

Kantanta mia bird', disko de Margaret Hill. Tradukoj de William Auld. Falkirk: West Records, 1973. 30 cm. Monofona, duflanka. 33t/m. Kun presitaj tekstoj. Jen jam la dua disko de Margaret Hill, kun nova dekduo da popolkantoj el la kvar landoj de Britujo. La kantoj estas ĉifoje iom pli artigitaj, kun pli varia akompano, kaj, aparte rimarkinde, kun plurvoĉa kantado en kelkaj kantoj. Tion oni faris per plurfoja registrado.

Muzike la disko estas altnivela: kvankam ŝi pli bele kantas sur podio ol antaŭ mikrofono, Margaret Hill plaĉe prezentas la kantojn. Al ŝia gitara memakompano kelkloke aldoniĝas bekfluto. Krome belas kelkaj kantoj tute senakompanaj. Verŝajne tamen eblus trovi pli da iom viglaj kantoj. Aparte impresas la belaj *Ho vee, vee* kaj *Eriskeja amkanto*, la amuzaj *Bele kaj agrable* kaj *La nigra ruband'* kaj la amara humuro de la *Kanto de fraŭlineto*: sed ĉiuj havas sian intereson.

La tradukoj estas bonaj, kvankam kelkloke (ekz. en *Ho vee, vee*) lingvaj licencoj kaj maloftaj vortoj ĝenas la popolecan etoson. La prononco estas agrabla, sed oni trovas, kiel antaŭe, ke kelkaj vokaloj, eble pro nerveco, misformiĝas dum la kantado.

Teknike, necesas diri, ke la sono estas tre malklara, kaj sen la presita teksto oni malfacile deĉifrus la vortojn. Plurloke aŭdiĝas iom da perturbo, kaj ĉiuj "s" de la teksto serpente siblas. Esperindas, ke ĉe postaj diskoj oni solvos tiun problemon.

Resume, kolektantoj de esperantaĵoj kaj de altfidel-aĵoj ne aĉetu la diskon: sed la muzikamantoj trovos ĉe ĝi veran plezuron.

Mendu ĉe UEA: 19,08 (por Nederlando 22,13) gld. + sendokostoj 10%.

NEKROLOGOJ

ITALO CHIUSSI (1919-1973)

En Frankfurto, FR Germanujo, mortis la 8an de junio 1973 Italo Chiussi, doktoro pri matematiko kaj membro de la Akademio de Esperanto. Naskita en Triesto, li vivis de post 1956 en FR Germanujo, kie li laboris unue kiel prokuristo, poste kiel direktoro de la reprezentejo de itala asekura kompanio. Li eklernis Esperanton en 1947, gvidis kursojn kaj estis prezidanto de la itala sekcio de TEJO. De 1964 ĝis 1967 li preparis la Esperantan tradukon de *La Nobla Korano*, kiu aperis en 1969, kun paralela teksto en la araba, en la serio *Oriento-Okcidento* kaj trovis altan aprezon flanke de arabaj kaj islamaj aŭtoritatoj. D-ro Chiussi ne plu ĝisvivis la aperon de prespreta biografia kompilaĵo pri Mahometo, *Je la flanko de la profeto*.

NIŜIMURA KOOGECU (1883-1973)

Mortis en Kameoka, Japanujo, la 2an de aprilo 1973 s-ro Niŝimura koogecu, grava figuro en la per-Esperanta agado de la Oomoto-religio. En 1925 li iris al Eŭropo kiel misiisto de la samjare fondita Universala Homama Asocio (de Oomoto) kaj fondis poste en Parizo ĝian Eŭropan Centron, kies oficiala lingvo estis Esperanto. Li verkis la broŝuron *Origino de Oomoto* (1925) kaj ĉefredaktis la revuon *Oomoto internacia* de tiam ĝis 1935, kiam la japana registaro ekpersekutis kaj malpermesis Oomoton. Li krome kompilis la antologion *Sinjoro laŭdata* (1928), estis elektita vicprezidanto de la 17a Universala Kongreso en Ĝenevo (1925) kaj estis membro de la Lingva Komitato de 1930 ĝis 1940.

G.J. DEGENKAMP (1895-1973)

La 5an de marto mortis post suferiga malsano Gijsbertus Johannes Degenkamp, konata ne nur en Nederlando, sed ankaŭ internacie, ĉefe per sia verko *Esperanto 60-jara. Skizo pri la lingvo literatura* (1947). Krome, li tradukis i.a. *La hispana tragedio* de Jef Last kaj *Skizoj pri Nederlando* de Karel Čapek. Kiel multjara redaktoro de *La Progresanto* kaj verkinto de nederlandlingvaj studoj pri propraj nomoj, prepozicioj kaj la Esperanta gramatiko li multe kontribuis al la lingva perfektigo de nederlandaj esperantistoj.


RUDOLF BARTOSCH (1899-1973)

La 12an de marto 1973 mortis Rudolf Bartosch, la iniciatinto de Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj (ILERA). Li atingis, ke *Ham's Interpreter*, deklingva vortaro por radio-amatoroj, inkluzivis Esperanto-terminojn ekde sia 5a eldono.

KOREKTO

En la junia *Esperanto*, sur p. 108, enŝteliĝis kompost-eraro. La koncerna frazo devas teksti: "Kvankam Drezen konstante emas vidi paralelojn inter la lukto en la burĝa Esperanto-movado kaj la kontraŭdiroj interne de la kapitalisma socio..."

Internacie uzebla lecionaro



Henrik Seppik

Recenzas Louis Beaucaire (Berlino):

La tuta Esperanto, de Henrik Seppik. Sofio: Urba Komitato de Bulgara Esperantista Asocio, 1971. 180p. 21cm.

Kiel profesia instruisto de Esperanto en Svedujo, Norvegujo kaj Ĉeĥoslovakujo, Henrik Seppik pliriĉigis sian didaktikan sperton per la demandoj, hezitoj, eraroj de lernantoj dezirantaj eliri el la stadio de la "eterna komencanteco". Ankaŭ memorante sian iaman propran scivolon pri lingvaj demandoj ne traktataj en elementaj lernolibroj, li kolektis, ordigis kaj redaktis la rezultojn de sia esplorado en libro origine destinita por svedaj lernantoj de la Internacia Lingvo.

Gratulinda ideo estis kompletigi la enhavon kaj reaperigi la verkon tute en Esperanto. Tio ebligas al

ĉiulandaj instruistoj uzi ĝin en siaj perfektigaj kursoj. Ankaŭ multaj unuopuloj, dezirante refreŝigi siajn konojn aŭ ricevi klaran respondon pri tiu ĉi aŭ tiu subtilaĵo, utile konservos ĉemane la lecionaron de *La tuta Esperanto*. Efektive, en facile komprenebla lingvo, kun multaj ekzemploj, interesaj ekzercoj, trafaj rimarkoj, H. Seppik invitas onin al kompleta rondiro ĉirkaŭ la hodiaŭa gramatiko de Esperanto.

Oni deziru al tiu libro ĉiam pli da reeldonoj, en kiuj estu korektitaj kelkaj eraroj (Oni ne sidas en "kino", sed en "kinejo" — "fotografo" ne estas "fotografisto") kaj en kiuj estu pli detale kaj nuance prezentita la paragrafo dediĉita al la pasivaj participoj (Neatenta leganto povus veni al la hereza konkludo, ke "krimulo estis arestata" kaj "krimulo estas arestita" estas samsencaj).

Espereble la eldonisto ankaŭ vestos la estontajn ekzemplerojn per iom pli fortika bindaĵo, taŭga por ofte konsultota libro.

Mendu ĉe UEA: 6,90 (por Nederlando 7,18) gld. plus sendokostoj 10%.



LASTE APERIS ...

Konsideroj pri matematikaj kaj stokastikaj terminoj en Esperanto. Unua kajero (1973) Olav Reiersøl. 26p. Mimeo. 30 cm. Senpage havebla de: Prof. O. Reiersøl, Matematisk Institutt, Postboks 1053, Blindern, Oslo 3, Norvegujo.

Koszalin salutas kaj invitas vin Turisma prospekto. Ricevebla de: Pola Esperanto-Asocio, Filio de Koszalin, pk. 30, PL-75-950 Koszalin.

Lerneja instruado de la Internacia Lingvo, La István Szerdahelyi. 30p. 21cm. 3,24 gld. (*Internacia Pedagogia Revuo*, speciala eldono, n-ro 1.) Enkonduko en la instrumentodon de Esperanto.

Naciaj malplimultoj en V.D.R., La (1973) Div. aŭtoroj. 135p. Mapo. 19cm. 1,80 gld. Entenas i.a. ĉapitron pri la lingvoj de la naciaj malplimultoj en Norda Vjetnamujo kaj la kreo aŭ perfektigo de ilia skribsistemo.

Nouveau cours rationnel d'espéranto (1973) 177p. Ilus. 21cm. 10,02 gld. 8a rev. eld. La unua eldono de tiu ĉi lernolibro por franclingvanoj estis publikigita de Revolucia Esperantista Federacio en 1921, sub la titolo *Cours rationnel et complet d'espéranto* kaj kun antaŭparolo de Henri Barbusse. La aŭtoroj, siatempe ne indikitaj, estis Jean Habert kaj Marcel Boubou.

Nova kursolibro de Esperanto (1972) Rondo Harmonia, 26p. Ilus. Mimeo. 25cm. 2,52 gld. 8a eld. Lernolibro por japanoj laŭ rekta metodo.

Paperoj de d-ro Ramljak, La Ante Ramljak (1893-1972). Kun prologo de Marinko Ĉivoje. Versojn esperantigis Emilija Lapenna. 80p. Ilus. 17cm. 7,50 gld. Poemoj kaj diverstemaj fragmentoj el la postlasaĵo de konata jugoslavia esperantisto.

Radioamatora Esperanto-terminaro por radiofonio: Ĵargona-Esperanta (1973) Esperantista Radio-Rondo de Pacifiko. 10p. Mimeo. 22cm. 0,90 gld. Terminaro angla-Esperanta.

Savo el la neĝo (1973) P. Korte. 77p. Ilus. Mimeo. 21cm. 4,08 gld. Aventura rakonto por geknaboj.

Sklavoj de Dio Géza Gárdonyi (1863-1922). El la hungara tr. J. Hamvai. 409p. 20cm. 10,50 gld. Romano, rigardata kiel unu el la modernaj klasikaĵoj en la hungara lingvo, pri la monaĥa kaj laika vivo kaj kutimoj de la 13a jarcento en Hungarujo.

Une humanité, une langue (1973) Simone Glodeau. 47p. 21cm. 2,22 gld. Franclingva informa libreto pri la lingva problemoj kaj Esperanto.

Vortaro Esperanta-kroata (1973) Zlatko Tišljarić. 65p. 16,5cm. 3,60 gld.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

Århus, Danlando (1973) Kolorilus. prospekto. Ricevebla de: Turistforeningen, Raadhuset, DK-8000 Århus.

Bibliografio de Internacia Lingvo (1929) P.E. Stojan (1884-1961). 560p. 23cm. Bindita. 56,—gld. La bibliografia ĉefverko de interlingvistiko, kun unupaĝa aldono de R. Haupenthal. Fotorepreso 1973.

Danĝera lingvo, La. Esperanto en la uragano de persekutoj (1973) Ulrich Lins (1943—). 67p. Mimeo. 23cm. 4,98 gld. Historia analizo de la persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo en la Tria Regno, en Soveta Unio sub Stalin, en antaŭmilita Japanujo kaj aliaj landoj.

Dokumentoj el Romo: 8-11 (1965, 1968, 1970, 1971). Tr. H. Roosen kaj H.G. Wannemakers (1973). 44p. 21cm. 2,70 gld. Entenas i.a. la enciklikojn *Humanae Vitae* kaj *Mysterium Fidei* kaj bibliografion de oficialaj katolikaj dokumentoj en Esperanto (1920-1971).

Floroj sen kompar' (1973) Margaret Hill kaj William Auld (1924—). 87p. Mimeo. 20,5cm. 4,08 gld. Tradukoj de britaj popolkantoj, kun muziknotoj.

Gotenburgo (1973) Kolorilus. faldprospekto. Ricevebla de: Oficejo de Turismo, Parkatan 2, S-411 38 Göteborg.

Hispana liriko Tomás Buesa Oliver. El la hispana tradukis F. de Diego (1973). 8p. Ilus. 22cm. 0,60 gld. Biografieto de la poeto Veremundo Mendez Coarasa (1898-1969) kun traduko de unu poemo.

Kantanta mia bird' (1973) Kantas Margaret Hill. Arangis Margaret kaj David Hill. Trad. William Auld. Duflanka. 33 t/m. 30cm. 19,08 gld. Kun teksto. Eld. West Records. Skotlando.

Kio estas JAT? (1973) Kolorilus. faldprospekto. Eldonis: Jugoslavia Aertransporto.

D-ro Italo Chiussi †

La araba kaj islama literaturo en Esperanto

Kiel ni anoncis en alia loko de tiu ĉi numero, forpasis d-ro Italo Chiussi, la konata tradukinto de La Nobla Korano. Tiu ĉi superrigardo pri la araba kaj islama literaturo en Esperanto, kiun verkis d-ro Chiussi por la preparata nova eldono de Enciklopedio de Esperanto, substrekas la signifon de la perdo de lia talenta kontribuado al pliuniversaligo de la traduka literaturo en la Internacia Lingvo.

Estas tre disvastigita en Okcidento la koncepto, ke ekzistas identeco inter "arabaj" kaj "islamaj" aferoj. Tiu ideo estas tamen absolute erara, kaj oni bezonas nur konsideri la fakton, ke el la ĉ. 500 milionoj da Islamanoj minimume 80% estas anoj de ne-arabe parolantaj nacioj kaj preskaŭ 93% loĝas ekster Arabujo, por kompreni, ke Islamo estas afero multe pli disvastigita ol la arabaj popoloj. Aliflanke, ekzistas ankaŭ, en la arabaj landoj, milionoj da personoj, kiuj estas ne-Islamanoj, kiel ekzemple en Mez-oriento, en Pakistano, Indonezio, Malajsio ktp.

En la ĉi-suba resumo pri la koncernaj sekcioj de la Esperanta literaturo oni tamen decidis unuigi la du temojn, ĉar en ambaŭ kazoj la kontaktoj kun la Esperanto-movado estis bedaŭrinde tre limigitaj kaj pro tio la verkoj en la Internacia Lingvo kaj pri araba literaturo (tradukoj kaj originalaj verkoj de arabaj aŭtoroj) kaj pri islamaj temoj estas ankoraŭ tre malmultaj kaj, kun unu nura escepto, tre malmulte ampleksaj.

La escepto estas la unue en 1969 aperinta traduko (kun originala araba teksto paralela) de *La Nobla Korano*, farita de prof. d-ro Italo Chiussi, membro de la Akademio de Esperanto, kiu havas la amplekson de ĉ. 670 paĝoj. Tiu verko aperis preskaŭ samtempe kun du aliaj ekstreme interesaj kaj altvaloraj verkoj malpli ampleksaj, tamen ankaŭ tre gravaj por la celo de la disvastigo de Esperanto en la araba kaj en la islama mondo, nome: *Esperanto-araba poŝvortaro* de Nassif Isaac (288p. — 1968) kaj *Esperanto-araba lernolibro* de la sama aŭtoro (72p. — 1969).

La Nobla Korano ricevis tre favoran akcepton fare de la publiko. La revuo *Esperanto* difinis tiun sukce-



D-roj Chiussi kaj Isaac dum la UK en Helsinki (1969).

son per la esprimo "furora disvendigo" kaj fakte post kvin monatoj ekde la apero la unua eldono tute elĉerpiĝis. La dua eldono sekvis tre rapide. Ankaŭ la oficialaj islamaj instancoj (ŝtatestroj de islamaj ŝtatoj), la ne-esperantista gazetaro, la Sekretariejo de Unuiĝintaj Nacioj ktp. gratulis tre varme al la aŭtoro kaj eldonejo pro la unike bela kaj grava eldonaĵo.

Oni ne rajtas tamen paroli pri la Korano ne menciante la pionirajn provojn tiurilatajn de la angla Islamano Colin (Qassim Isma'el) Evans, kiu en la jaro 1942 publikigis en *Esperanto Internacia* artikolon sub la titolo "La Islama Biblio — Provo de antaŭparolo kaj elĉerpaĵoj el proponita traduko de la Korano". La sama aŭtoro verkis ankaŭ broŝureton *Islamo esperantiste rigardata* (32p. — jaro nekonata). El malnovaj kontaktoj kun Islamo kaj la araba mondo ni ankoraŭ memoru la broŝureton *Islamo ĉies religio* de Mohammad Taufiek Ahmad (15p. — 1929) kaj kelkajn pli bone konatajn literaturaĵojn kiel *Rakontoj el mil kaj unu noktoj* (31p. — 1927), *Aventuroj de la Kalifo Alraŝid* (32p. — Cox — 1909) kaj *Aladin* kaj *Ali Baba* (60 resp. 24p. — Cox — 1908/1909). Antaŭ nelonge aperis ankaŭ tri aliaj malgrandaj verkoj, nome *Vojaĝimpresoj de Egipto tra Eŭropo kaj Azio per Esperanto*, de la sama antaŭe danke menciita aŭtoro Nassif Isaac (64p. — 1967), *Arabaj maksimumoj* de Husen Al-Amili (77p. — 1967) kaj broŝureto kun la titolo *Kial mi kredas je l'Islamo*, kiu enhavas de d-ro Chiussi esperantigitan radioparoladon de Hazrat Mirza Baŝiruddin Mahmud Ahmad, estinta ĉefo de la Movado Ahmadiyya de Islamo (Pakistano). Eble per la Korano kaj per la lernolibroj de d-ro Isaac, kiuj estas tre modernaj kaj taŭgaj por la praktika uzado, la Esperanta literaturo el aŭ pri tiaj temoj estonte riĉiĝos. Ni ricevis informojn pri kelkaj interesaj manuskriptoj de elarabigitaj verkoj de Ĥalil Ĝibran, kiuj espereble baldaŭ estos publikigitaj.*

* Post kiam d-ro Chiussi verkis tiun ĉi manuskripton, efektive aperis "Rakontoj kaj poemoj" de Ĝ. Ĥalil' Ĝibran', en traduko de Georgo Abraham (Rio de Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1972. 150p. 12,78 gld.).

Antaŭparolon por "La Nobla Korano" verkis Sir Muhammad Zafrulla Khan, juĝisto de la Internacia Kortumo en Hago kaj eminenta aŭtoritato pri Islamo — tie ĉi en konversacio kun d-ro Chiussi.



NIA KONGRESO

Hamburgo

ofe

*La televida turo kun rotacianta
restoracio: Hamburgo havas multajn
allogojn — tage kaj nokte.*

solena malfermo, balo, teatrovespero, la multaj kun-
sidoj grandaj kaj etaj. Rekte antaŭ la domo, je
la suda flanko, estas granda parko, kie eblas ripozige
promeni aŭ sunbani inter la kunvenoj. Malgraŭ tiu
verda ĉirkaŭaĵo piediranto atingas la urbodomon en
10 minutoj.


La lukson ni aĉetis per unufoja lupago, kaj la espe-
rantistoj ĝuu ĝin. Kiu, paginte por tio sian kongres-
kotizon, volas dumkongrese eviti elspezegojn, povas
manĝi en la multaj mez- kaj malaltkostaj restoracioj
proksime. Same eblas loĝi en Hamburgo preze, nu
ne kiel en fora vilaĝo, sed samkoste kiel en aliaj
grandurboj de la okcidento, kie ni jam kongresis.
La kongresejo estas bonege atingebla per enurbaj
rapidtrajnoj, por kies uzo eblas aĉeti specialan turi-
stan bileton, kaj la aŭtistoj povas parki en la kelo de
la kongresejo aĉetinte specialan rajtigilon por la tuta
kongressemajno.

La kongresa programo enhavos ĉiujn kutimajn erojn,
sed LKK dediĉadas specialan atenton al raraĵo: libera

Hindino en sario, arabo kun turbano — tiuj gastoj
en mezeŭropaj urboj vekas atenton. Sed en Hambur-
go ili povas pasi sur la pompstrato "Promenejo de la
Virgulinoj" sen turniĝantaj kapoj de la civitanaj
kontoruloj. La mondurbo jam alkiutimiĝis al fremd-
uloj dum jarcentoj. Kiel ĉefa havenurbo ĝi estas
malfermita al la tuta mondo. 78 konsulejoj, la due
granda kvanto post tiu de Novjorko, signas tiun
tergloban interligitecon koncentritan al tiu trafik-
nodo kun 2 milionoj da enloĝantoj — Hamburgo.
La komercista spirito ĉiam zorgis pri kostŝparaj
investoj en la urbo. Malnovaj domoj ne adekvatas
al modernaj bezonoj; for ilin. Kasteloj aŭ aliaj mani-
festaĵoj de la nobeloj neniam estis tolerataj de la
liberemaj loĝantoj; ankaŭ tiuj konstruaĵoj mankas.
Malgraŭ tiu foresto de "tipe germana" urbaspekto
Hamburgo allogas: la vivoplenaj aĉetstratoj de la
milioncentro, la nepre fotinda haveno, multege da
parkoj kaj verdaĵoj, la preskaŭ-jam-kutimaĵoj: urbo-
domo, universitato, bestĝardeno, televidturo kun
rotacianta restoracio ... kaj ne estas sekreto, ke mul-
tajn forte altiras la marista-turista amuzkvartalo
Sankta Paŭli, kie sekso ardas, sed kie ankaŭ eblas
simple bierumi.

Sunbani inter la kunvenoj

Hamburgo estas atingebla facile kaj por multaj eĉ
malmultekoste; de la devizbariero inter kapitalismaj
kaj socialismaj landoj disigas ĝin nur 30 km en la
Federacia Respubliko Germanujo. Tiu situo antaŭ-
destinas la urbon al kongresloko. Por tiuj kunvenoj
ĵus grandioza kongresejo estis konstruita. Ĝi gastigos
ankaŭ la 59-an Universalan Kongreson de Esperanto
en la somero de 1974. Ĉio okazos sub unu tegmento:



URBO EN 1974


*En la cirklo estas videbla la ĵus
finkonstruita kongresejo de Hamburgo:
Tie ĉi okazos la 59a Universala
Kongreso de Esperanto.*

itas

ripozon

W. Bormann tempo. Ĉar Hamburgo tiom ofertas por vidi, estus domaĝe enkasernigi la esperantistojn en la kongresejo. La multaj kongresanoj, kiuj fotos sian privatan diapozitivserion Hamburgo (ravaj havenmotivoj!), la multaj gepatroj, kiuj devos aĉeti donacojn por aliloke feriantaj infanoj, la multaj edzoj serĉantaj kunport-aĵojn por siaj "kongresvidvinoj", la (multaj?) diboĉemuloj por la vespera kaj nokta vivoj de Hamburgo, kiam ili aktiviĝu, se la kongresprogramo ne estas sufiĉe truhava?

Ripoziga estu la ekskurstago, ne nervostreĉo en varmegaj aŭtobusoj klopodantaj pri rekordaj kilometroj. Unu ekskurso veturos en trajno, kun dancvagono, al la balta maro, por tie havi banpaŭzon de kvar horoj, la alia sur ŝipo sur la rivero Elbe kun paŭzo en ĉarma urbeto. Ankaŭ tiu propono al la kongrespartoprenontoj staras sub la moto: la esperantistoj estas dezirataj gastoj, kiuj mem decidas, ĉu veni aŭ ne, kaj nia oferto devas esti tia, ke multaj homoj volonte venos por la 59a al Hamburgo, kie ili devas elspezi sian propran monon.




Gepatroj kun Esperanto-infanoj povos liberiĝi de la prizorgado por la etuloj, ĉar infana kongreseto funkcios por 60 geknaboj, apud la urbo, tamen rapide atingebla per subtera fervojo, kiam oni volas mem vidi la bonfarton de siaj idoj. La nevidantoj, kontraŭe, estos meze inter la kongresanoj. En Hamburgo la stranga izoligo de la blindaj esperantistoj, konata el iuj antaŭaj kongresoj, ne estos ripetita. Por ili la kongresejo kun ĉio sub la sama tegmento estas speciala helpo, ne nur agrablaĵo kiel por la aliaj kongresanoj.

Kompreneble la Esperanto-turisto havos sian oferton de kongresado. Antaŭkongreso okazos en Fredericia en Danlando (sur la "kontinenta" duoninsulo Jutlando) kaj postkongreso en Kronach. Tiu ĉarma urbeto troviĝas, ne tute korekte sed proksimume, en la angulo formita de Federacia Respubliko Germanujo, Germana Demokratia Respubliko kaj Ĉeĥoslovakio. La postkongresanoj estos akceptitaj en la stacidomo de bavara blovorkestro, vizitos bierfarejon, ĝuos kulturen programon en la urbo de la pentro-artisto Lucas Cranach — ĉio promesas agrablegan restadon. Kaj tie estas la "tipe germana" pejzaĝo, la kastelo, eĉ grandega, ktp. Intence LKK ofertas urbon en la sudo, por ke la interesitoj povu ekkoni plian parton de F.R. Germanujo.

La preparoj marŝas

Ankoraŭ multo estus dirinda! Por allogi junulojn servas la TEJO-kongreso en Münster; ĉi-foje ne tiel elstaros la jarfinaj renkontiĝoj de GEJ, sed la granda mezsomera renkontiĝo. La instruistoj povos kunveni en la "Internacia Domo Sonnenberg" en la Harz-montaro por la jam kutima ILEI-konferenco. Ambaŭ renkontiĝoj okazos antaŭ la kongreso en proksimaj lokoj, tiel ke facile eblos viziti la grandan kongreson. La preparoj marŝas, la zorgado pri ĝuplenaj tagoj staras en la centro de la atento - nun ankoraŭ mankas nur la gastoj, kiuj povos aliĝi tuj post la ĉi-jara kongreso en Beograd.

Hamburgo valoras vojaĝon. Venu mem kaj konstatu la pravecon de tiu slogano, ankaŭ por esperantistoj. Multnombro aliĝu al la 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo en 1974!



Ĉi tiuj strangaj mebloj estas la grandaj kompaktaj libroŝrankoj de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds, kie kuŝas la materialo de CDELI, stokigita tiel plej spaco-ŝpare. La libroŝrankoj povas disiĝi unu de la alia sur specialaj reloj: tiamaniere la libroj iĝas alireblaj.

Kiel kaj kial naskiĝis la ideo

Antaŭ pli ol dek jaroj iu aktiva esperantisto de franclingva Svislando, Claude Gacond, kiu jam de kelkaj jaroj interesiĝis pri la historio de Esperanto, rimarkis, ke post la morto de esperantista pioniro plejofte liaj leteroj, manuskriptoj kaj nebinditaj revuokolektoj malaperas en rubujo. Restas ĝenerale nur la libroj, kiuj nur pli malfrue migras al antikvaĵisto. Tiu junulo pensis, do, ke estus oportune krei deponejon por materialo venanta el postlasaĵoj, por ke ili saviĝu por pli postaj esplorantoj kaj sciencistoj. Li ja bone sciis, ke nur materialoj kiel leteroj, internaj bultenoj, malgrandaj lokaj revuetoj, cirkuleroj, fotoĵoj, broŝuroj, eksplikas la konscion de movado pri si mem. Kaj la historion de movado ni povas koni nur, se ni analizas pacience kaj atente tiun memkonscion, kiu nedevige devas respondi al la realo. Tre ofte la homoj opinias pri si mem kaj pri la realo ion tute ne veran, agas laŭ propra konscio, kaj, jen, estiĝas iu alia, antaŭe ne atendita afero.

Analizo de tiu fenomeno permesas pli bonan konon de la historiaj momentoj, de la socia fono, de la media etoso de la movado. Tiel kaj tial naskiĝis la ideo de dokumentejo pri ĉio, kio koncernas Esperanton kaj la mondlingvan demandon.

Interlingvistiko kaj planlingvistiko en Svislando

Ne nur esperantistoj interesiĝas pri interlingvistiko (scienco, kiu studas la kontakton inter diverslingvaj homoj) kaj pri planlingvistiko (scienco, kiu determinas la principojn, laŭ kiuj oni povas plani lingvojn, ĉu etnajn, ĉu ne-etnajn). Ni jam legis en *Esperanto*, ke granda interesiĝo naskiĝis pri tiuj temoj preskaŭ ĉie en la mondo, sed aparte en Usono, Sovetunio, Italujo kaj Hungarujo (ĉirkaŭ prof. d-ro Szerdahelyi), ĉe profesiaj lingvistoj. La moderna strukturala kaj gener-transforma lingvistiko permesas la aplikon de

En Svislando kreiĝis internacia renkontiĝejo interlingvistika

Grupo el CDELI-kunlaborantoj (mankas nur la arkivisto, s-ro Claude Gacond, kaj la tri membroj de la Konsulta Komisiono): plej dekstre estas s-ino Boichat, profesia bibliotekistino. Plej maldekstre estas s-ino Berger, kiu okupiĝas pri la klasifiko de la revuoj kaj periodaĵoj. Ĉe la angulo de la tablo estas s-ino Andrée Gacond, kiu okupiĝas pri la slipo-pretigo. Inter s-ino Gacond kaj s-ino Boichat estas s-ro Alphonse Matejka, adepto de Occidental, kiu okupiĝas pri la t.n. "naturismaj" planlingvaj projektoj.



modernaj lingvistikaj metodoj al interlingvistiko kaj al planlingvistiko, kie antaŭe regis malnovaj filologiaj tezoj.

Sed estas fakto konata, ke el 100 planlingvanoj, 99 estas esperantistoj, dum unu apartenas al alispeca planlingvo. Ĝenerale, en pluraj landoj, ekzistas sufiĉe streĉitaj rilatoj inter esperantistoj kaj ali-planlingvanoj. En Svislando, feliĉe, ne. Ni vidis, ke amika kunlaboro multe pli efikas ol senfinaj kvereloj kaj disputaĵoj: se vere la problemo de lingvo internacia planita estas scienca problemo (kaj mi estas certa, ke ĝi estas tia), ĝi devas esti traktata per sciencaj analizoj (do sur scienca bazo), kaj neniel sur afekcia aŭ persona nivelo: tiaj sistemoj nur ridindigas la planlingvanojn antaŭ la okuloj de interesataj sciencistoj.

Tiu kunlaboro evidentigis, ke bona volo ne sufiĉas. Estas necese krei (aŭ havi je dispono) grandan moderne ekipitan publikan bibliotekon, kiu subtenos tiun deponojn (kiun ni nomos ekde nun "Centro"); estas necesa granda dokumentaro plej diversspeca pri planlingvistiko kaj interlingvistiko; kaj estas oportune krei la eblon regule renkontiĝi.

La urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds

Multaj homoj konas la urbon La Chaux-de-Fonds (prononcu: Laŝodfon'), horloĝista centro progresema. Kelkaj scias, ke ĝia biblioteko jam akceptis la tutan bibliotekon de Edmond Privat kaj pagis dum pluraj jaroj arkiviston por ties reordigo. Kial do la urbo ne interesiĝu ankaŭ pri planlingvistika centro oficiale ligita al ĝia biblioteko?

Kaj, fakte, la urbo interesiĝis. En 1967 ĝi oficiale kreis Centron de dokumentado kaj de studo pri la lingvo internacia. La komenco estis modesta, sed iom post iom ĝi grandiĝis, kaj ĝi ampleksigis sian agadon per la aktivo de diverstendencaj, sed same celantaj homoj.



La Centro de dokumentado kaj de studo pri la lingvo internacia

Unue, kreskis la materialo: pluraj svisaj Esperanto-asocioj ligiĝis per konvencio kun la Centro, cedante tiel siajn arkivojn kaj bibliotekojn. Aldoniĝis ankaŭ privataj donacemuloj: ankaŭ ili ligiĝis per konvencio, kaj cedis plej varian materialon. Tiamaniere nuntempe nia Centro havas preskaŭ kompletan dokumentaron pri Esperanto, Ido, Occidental, kaj atentindan materialon pri Volapük kaj Interlingua. Sed kreskis

La prezidanto de la Konsulta Komisiono de la Centro pri dokumentado kaj studo pri la lingvo internacia (CDELI), d-ro Tazio Carlevaro, ĉe sia labortablo.

ankaŭ la helpantaro: komence, nur Claude Gacond kaj arkivistino laboris tie dum unu tago semajne. Nuntempe laboras surloke 5-6 homoj, kaj ekstere troviĝas aliaj helpantoj kun bone difinitaj celoj. Interalie, ekzistas nun oficiala arkivisto (s-ro Claude Gacond), kaj trimembra Konsulta Komisiono, kiu kontrolas kaj subtenas la agadon de la Centro. Montriĝis oportune havi komunan lingvon: ĝi estas la franca, lingvo de la gastiganta urbo.

Sed ne nur kolekto gravas: ankaŭ valorigo de la kolektita materialo estas celo de la Centro: baldaŭ ĝi organizos malgrandan interlingvistikan muzeon-ekspozicion en la salono de la Centro mem, ĉe la urba biblioteko. Kaj ankaŭ renkontiĝoj estas antaŭvidataj: sciencaj seminarioj pri interlingvistiko kaj planlingvistiko, kaj renkontiĝoj en la salono de la Centro, kiu estas je dispono de planlingvistikaj asocioj kunlaborantaj.


La Centro (laŭ la franca mallongigo: CDELI) estas do ne nur dokumentejo, baldaŭ plej moderne ekipita, sed ankaŭ renkontiĝejo por seriozaj esploremuloj kaj por ordinara planlingvanoj interesataj al nia laboro. La urbo proponis stipendion al studento de la Esperanto-fako de la budapeŝta universitato Eötvös Loránd por restado en La Chaux-de-Fonds dum du monatoj por la scienca arkivista laboro. Plue, CDELI nun havas eĉ interlingvistikan librovendejon, gvidatan de s-ro R. Haupenthal, kun ĉiam pli ampleksa katalogo de vendeblaj libroj pri interlingvistiko.

Laboro konstanta kaj intensa, sed faka kaj specialigita, en medio neŭtrala, kaj principe favora al realismo, ĝenerale kondukas al sukceso kaj al firmiĝo de la rezultoj atingitaj.

D-ro Tazio Carlevaro

Utilaj adresoj:

- ♦ Por arkivistaj problemoj kaj vizitoj al CDELI: S-ro Claude Gacond, ĉe CDELI, Bibliothèque de la Ville, Numa-Droz 46, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando.
- ♦ Por interlingvistikaj kontaktoj kaj aldonaj informoj: d-ro Tazio Carlevaro, Casa Cicognana, CH-6883 Novazzano, Svislando.
- ♦ Por la librovendeja servo de CDELI: s-ro Reinhard Haupenthal, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler, F.R. Germanujo.



LOKE — FAKE — PERSONE

LOKE

Germana Demokratia Respubliko

- La ilustrita revuo N.B.I. en orienta Berlino raportis en junio pri "nova allogaĵo" de la ĉefurbo de GDR: 30 gvidistinoj, en vinruĝaj kostumoj kaj kun blank-ledaj ĉapoj, pretas doni al turistoj informojn "en ok lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto".

Hispanujo

- La ĉefredaktoro de la itala Esperanta revuo *Literatura foiro*, Giorgio Silfer, vizitis en la unua semajno de julio Barcelonon kaj apudajn lokojn de Hispanujo. Li faris plurajn prelegojn pri Esperanto kaj pri itala folkloro. Krome, Klubo de Amikoj de Unesko organizis publikan debaton pri "Esperanto kiel lingva kaj socia movado". La paroladojn de Silfer ĉeestis granda nombro de aŭskultantoj, precipe gejunuloj.

Koreujo

- La sud-korea registaro decidis vastigi la instruadon de fremdaj lingvoj. Tio signifas, ke la angla perdos sian preskaŭ monopolan pozicion en la universitatoj kaj lernejoj. Fine de junio la ministerio de edukado dekretis, ke gejunuloj, kiuj deziras eniri la universitaton, povas elekti el inter kvin fremdaj lingvoj; ĝis nun la kandidatoj estis ekzamenataj nur en la angla. Aldone al tio, ekde 1974 la posemajnaj lecionoj de la angla lingvo en mezlernejoj reduktiĝos de kvin al kvar instruhoroj.

PERSONE

Kalocsay

- En serio de "Sciencaj Vesperoj" de la budapeŝta klubo "Konkordo" la 7an de majo prof. K. Kalocsay prelegis pri vortfarado en Esperanto kaj la scienca lingvo. (Vidu la foton.) Ĉirkaŭ okdek aŭskultantoj entuziasme aplaŭdis al la konata kultura aganto.

Kaŭakami

- F-ino Tamiko Kaŭakami, japanino loĝanta en Norvegujo, en julio vojaĝis tra pluraj landoj de okcidenta Afriko, informante pri Esperanto. La unuaj eĥoj jam atingis la Centran Oficejon de UEA, al kiu skribis pluraj liberianoj post artikoloj aperintaj en liberiaj gazetoj. La C.O. kunlaboras per provizado de artikoloj, senpaga sendo de lernolibroj k.s.

Solena procesio de honoraj doktoroj kaj magistroj al la festa salono de la Universitato de Helsinko. En la unua vico marŝas Vilho Setälä (la dua de maldekstre), al kiu la Filozofia Fakultato aljuĝis honoran doktorecon (vd. "Esperanto", majo, pĝ. 93). La "promotoro", prof. Gustaf Elfving, nomis dum la ceremonio, la 31an de majo, kiel meritojn de d-ro Setälä liajn esperantologiajn studojn apud statistikaj kaj tipologiaj studoj pri la finna lingvo kaj finnaj terminoj por la moderna tekniko.

FAKE

Literaturo

- En la avangarda eldonejo Futura, Lisbono, ĵus aperis portugallingva traduko de la originala novelaro de Miyamoto masao *Pri arto kaj morto* (1967). La tradukon kaj enkondukon prizorgis Manuei de Seabra.

- Lastatempe estas rimarkebla nova interesiĝo pri la blinda rusa poeto V. Eroŝenko (1890-1952), kiu verkis ruse, Esperante, ĉine kaj japane. Ĵus aperis granda ukrainingva romano pri Eroŝenko, el la plumo de Nadja Andrianova, kaj ampleksan novelon pri li publikigis la japanlingva revuo *Sovetunio hodiaŭ*.

- En sia numero de majo 1973, la grava pedagogia kaj kultura revuo *Hispania*, organo de Usona Asocio de Instruistoj de la Hispana kaj Portugala, publikigis anglalingvan noton de Prof. Richard E. Wood (Ŝtata Universitato Louisiana) pri la lastatempaj eldonoj de esperantlingvaj tradukoj de la portugala nacia eposo *La Luzidoj*, de Camões, kaj la konata hispana romano *La Arbo de la Sciado*, de Pío Baroja. Interalie oni citis el la enkonduko al tiu romano, de Prof. Juan Régulo-Pérez. La membraro de la Asocio konsistas el 13 500 profesiaj lingvoinstruistoj en Usono kaj Kanado.

Radio

- En anglalingva elsendo de Radio Kiev por aŭskultantoj en Nordameriko (1973-05-31) oni memorigis, ke Sovetunio unuafoje en la mondo eldonis poŝtmarkon kun surskribo en Esperanto. Temas pri la konata poŝtmarko de 1925 portanta la bildon de Aleksandr Popov kaj la tekston "Inventisto de Radio — Popov".



TEJO-PAGŬO



TEJO

TEJO-redaktoro: G. D. Winkler

Jaegerstr. 27, D-42 Oberhausen-Sterkrade, F.R.G.

5a INTERNACIA JUNULARA RENKONTIĜO DE AEJ/GEJ

De la 17a ĝis 24a de aprilo en Berchtesgaden (FR Germanujo) kaj Salzburg (Aŭstrujo) okazis la 5a Internacia Junulara Renkontiĝo, kiun partoprenis pli ol trideko da gejunuloj el kvin da landoj. La aranĝo ofertis aron da turismaj programoj kiel i.a. viziton al granda salminejo, montarajn migradojn, viziton de la aŭstra urbo Salzburg kaj de ĝia ĉefa gazeto. Tamen estis ankaŭ laboraj kunsidoj kun diskutoj pri amas-komunikila kaj hommedia temaroj (preparante partoprenon ĉe IJK en Sarajevo). Eĉ oni tradukis aron da kanzonoj al Esperanto. La kunveno estis plaĉa, precipe la endoma diskoteko sukcese kontribuis al pli intima atmosfero. Dum fina kritikkunveno ĉiuj partoprenantoj esprimis sian kontenton pri la tuta aranĝo.



La aldonita foto montras la partoprenantaron okaze de vizito al la salminejo. Dekstre nia aŭstra amiko Toni Oberndorfer, ĉefa organizanto de la aranĝo.

PLURNACIAJ ARANĜOJ DE NEJ

La nederlanda sekcio de TEJO anoncas du semajnfinaĵajn aranĝojn:

1. de la 28a ĝis 30a de septembro 1973 en Ellecom ĉe Arnhem, kiu temos pri selektiga funkcio de lingvo-instruado en F.R.Germanujo kaj Nederlando, komuna aranĝo kun la germanaj najbaroj el GEJ.
2. de la 26a ĝis 28a de oktobro 1973 en Valkenswaard ĉe Eindhoven, kiu temos pri ekonomiaj kaj kulturaj sekvoj de la aliĝo de Britujo al Eŭropa Komunumo, komuna aranĝo kun la belgaj najbaroj el BEJA.

Pri ambaŭ aranĝoj detalajn informojn volonte disponigos NEJ-prezidanto Gerard Peet, Comeniushof 40, Hilversum-1304, Nederlando.



EL LA RIĈA VIVO DE EJANZ

Post sepjara ekzisto EJANZ, la sekcio de TEJO en Nov-Zelando, nun havas cent membrojn! En 1972 proksimume 900 lernantoj lernis Esperanton en nov-zelandaj lernejoj, plimulto de ili en oficialaj klasoj. Menciindas aro da okazintaĵoj: i.a. 3a tendaro de EJANZ januare en Pahautea, partopreno multnombra ĉe la Landa Kongreso en Wellington, februara renkontiĝo en Woodend apud Christchurch (ni raportis). Maje, julie kaj aŭguste diversaj aktivuloj veturadis tra la lando, vizitante grupojn kaj lernejojn. Decembre okazis komuna festado kristnaska. Celo de ĉiuj tiuj agadoj estis plifortigi kontaktojn inter la disigitaj grupoj kaj kuraĝigi ilin al kromaj kontaktoj kaj plua kunlaboro.

Rezulte de la 3a tendaro granda foto kaj ampleksa teksto aperis en grava gazeto. Dum la Landa Kongreso anino de EJANZ okaze de radia intervjuo povis prezenti agadojn de EJANZ al vasta publiko. Aperis ses numeroj de "junularo", la propra gazeto, unu eĉ kun aro da fotoj. Enestis novaĵoj, rakontoj, desegnaĵoj kaj informoj. Dum la jaro 26 paĝoj estis presitaj speciale por varbaj kaj instruaj celoj kaj po 700 ekzempleroj estis disdonitaj ĉe deko da lernejoj. Sonbendoj akompanis kelkajn tekstojn.

Aliaj presaĵoj devis esti multobligitaj. Tamen, per eksperimento, senlima pacienco, kaj nigriĝo de la aktivuloj, oni alfrontis la malfacilaĵojn. La metodo estis simpla: aro da "volontuloj" metis ĉiun paĝon individue, post preso, sur la plankon, tiel ke unu ne kuŝu sur alia, minimumigante trapreson de inko de supra al malsupra paĝo. Per tiu metodo oni facile sukcesas tute malordigi la ĉambron, en kiu troviĝas la multobligaparato, sed ankaŭ akiras la plej bonajn rezultojn en duflanka presado per malnova, azene obstina maŝino.

Tiel i.a. presiĝis "Unujara Laborplano" (materialo taŭga por instruado en lernejoj), informa faldfolio en la angla lingvo, reklamilo esperantlingva pri "Lerta Leganto 4" kaj la "Fantoma Stampisto" (teatraĵo). Decembre, krom la jarraporto, sekvis libreto, kiu enhavas du teatraĵojn verkitajn en Esperanto de EJANZanoj.

En la serio "Lerta Leganto", kiu estas profesie presata, aperis n-roj 4 kaj 5, enhavantaj facilajn rakontojn, teatraĵojn kaj ekzercojn por lerneja kaj komencanta uzo.

Resume taksante la agadojn de EJANZ dum 1972, ni konstati, ke ili estis kontentigaj; kreskis la anaro, sukcesis la aranĝoj, montris esperigajn rezultojn kaj la lerneja kaj la publika agadoj, komenciĝis transdono de EJANZgvidado al pli junaj agantoj. Multaj problemoj bone solviĝis, tamen montriĝas aro da ankoraŭ farendaj laboroj.

LA PASIVAJ PARTICIPAJ VERBOFORMOJ EN ESPERANTO

En antaŭa numero ni parolis pri la **AKTIVAJ** participoj kaj donis ekzemplojn de iliaj adjektivaj kaj adverbaj formoj.

La verboj, kiuj laŭ sia senco estas **TRANSITIVAJ**, povas esti uzataj ankaŭ en pasiva formo. Tiuj pasivaj participaj finaĵoj estas **AT'**, **IT'** kaj **OT'**. Ili povas, same kiel la aktivaj formoj, esti **ADJEKTIVAJ** aŭ **ADVERBAJ**. En sia adjektiva formo ili finiĝas je **A** (en pluralo **AJ**):

La batata hundo, la punata knabo (la hundo, kiu estas batata — kiun oni batas) (la knabo, kiu estas punata — kiun oni punas)

La perdita mono, la farita tasko (la mono, kiu estas perdita — kiun oni perdis) (la tasko, kiu estas farita — kiun oni faris)

La skribota letero, la uzota ilo (la letero, kiu estas skribota — kiun oni skribos) (la ilo, kiu estas uzota — kiun oni uzos)

Kiam kursano studas lecionon, la kursano **ESTAS STUDANTA** kaj la leciono estas **STUDATA**, sekve: la studanta kursano kaj la studata leciono. Kiam li finis la studon de la leciono, li **ESTAS STUDINTA** kaj la leciono **ESTAS STUDITA**, sekve: la studinta kursano kaj la studita leciono. Antaŭ ol li komencas la studon de la leciono, li **ESTAS STUDONTA** kaj la leciono **ESTAS STUDOTA**, sekve: la studonta kursano kaj la studota leciono.

En siaj adverbaj formoj (**ATE**, **ITE**, **OTE**), tiuj participaj formoj, same kiel la aktivaj formoj, ofte reprezentas preskaŭ kompletan subfrazon. Denove oni devas strikte observi la regulon, ke tiuj adverbaj participaj formoj estas *allaseblaj* nur, kiam la subjekto, kiu estas kaŝita en ili, estas la sama kiel la subjekto en la ĉefa frazo (propozicio).

Salutate, li ĉiam afable resalutas (= Kiam **LI** estas salutata, **LI** ĉiam afable resalutas).

Lavate, la bebo ploras (= Kiam **LA BEBO** estas lavata, **LA BEBO** — suĉinfano — ploras).

Lavite, la bebo ekdormis (= Kiam **LA BEBO** estis lavita, **LA BEBO** ekdormis).

Bone informite pri miaj devoj, mi komencis mian laboron (= Kiam **MI** estis bone informita pri miaj devoj, **MI** komencis mian laboron).

Pendigote, la krimulo havis lastan deziron (= Kiam **LA KRIMULO** estis pendigota, **LA KRIMULO** havis lastan deziron).

Buĉote post kelke da semajnoj, la meleagroj ricevis grasigan nutraĵon de la farmistino. (= Ĉar **LA MELEAGROJ** estis buĉotaj post kelke da semajnoj, **LA MELEAGROJ** ricevis grasigan nutraĵon de la farmistino).

Se, en la lasta frazo, oni dirus: "Buĉote post kelke da semajnoj, la farmistino donis grasigan nutraĵon al la meleagroj", tiam la frazo signifus, ke la farmi-

stino estis buĉota post kelke da semajnoj, ĉar "la farmistino" estas ja la subjekto de la ĉefa frazo, do, aŭtomate, la subjekto de la participa formo "buĉote". (Ĉar la farmistino estis buĉota post kelke da semajnoj, la farmistino donis grasigan nutraĵon al la birdoj).

Vi nun studu (kaj analizu) jenajn frazojn:

1. Preterpasanto, vidante la knabojn sur la glacio, avertis, kriante laŭte, ke ĝi ankoraŭ ne estAS sufiĉe fortika.
2. Avertite, la knaboj tamen restis sur la glacio.
3. Apenaŭ foririnte, li aŭdis la knabojn kriegi por helpo.
4. Turnante sian rigardon en tiun direkton, li vidis unu el la knaboj falintan tra truon en la glacio.
5. Tute konsternite, li kuregis al la truon, sed, veninte en la apudecon de la truon, li eksentis, ke la glacio komencAS kurbiĝi sub liaj piedoj.
6. Li komprenis la sencecon de siaj bone intencitaj klopodoj kaj restis staranta.
7. Per sia promen-bastono, ligita al ŝnuro, li provis atingi la baraktantan knabon.
8. Savite, la savito dankis la helpeman savinton.

Klarigo:

al-las-ebl-a: permesita, (la reguloj de la gramatiko de Esperanto ne allasas (permesas) esceptojn; esceptoj ne estas allaseblaj).

PLI MIZERA

Paciento diras al sia psikiatro: "Doktoro, ekde kiam vi kuracas min, mi sentas min eĉ pli mizera ol antaŭe, ĉar antaŭ mia saniĝo mi almenaŭ imagis esti Napoleono sed nun mi estas absolute nenio, nulo..."



"Karulino mia, kial vi akceptas min en plena mallumo?"

"Ĉar mi devis promesi al mia patrino, ke mi ne plu vidos vin."



ESPERANTO EN RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1972, Dua Parto, p. 338. Mallongigoj: I = Informoj; P = parolado ; K = Kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs). 41.27 m (7270 kcs). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝto-kesto 46, Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Warszawa, 41.99 m (7145 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 31.01 m (9675 kcs).

Dimanĉe

08.30-08.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
10.30-11.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 47.69 m (6290 kcs), 40.18 m (7470 kcs), 35.62 m (8425 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
12.30-13.00 Pekino, 54.10 m (5545 kcs), 36.41 m (8240 kcs), 25.04 m (11980 kcs), 19.89 m (15080 kcs), 16.97 m (17680 kcs). I.
20.00-20.20 Roma, 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italujo.
20.05-20.30 Sofia, 50.61 m (5928 kcs). P.
22.45-23.00 Valencia, 358 m (836 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs) kaj Guarulhos, 205 m (1460 kcs), 90.23 m (3325 kcs). I.K. Sintezo de Esperanto, Caixa Postal 370, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.
12.00-12.15 Gdańsk, 66.29 Mcs (mod. frekv.). Ripeto de la antaŭa vendreda programo el Warszawa. (ĉiun alternan lundon).
12.20-12.30 Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (d-ro A. Baur), Svisa Radio, SOC, CH-3000 Bern 16, Svislando.

Marde

16.45-17.00 Bratislava, 68.84 Mcs (mod. frekv.) kaj aliaj stacioj 67.94 Mcs, 69.20 Mcs, 69.50 Mcs, 69.68 Mcs. K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakujo.

Merkrede

12.20-12.30 Bern, kiel lunde (s-ro Gacond).
13.00-13.15 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A-1041 Wien, Aŭstrujo. (Ĉiun kvaran sinsekvan merkredon).
19.30-19.45 Sabadell, 203 m (1475 kcs), 89.1 Mcs (mod. frekv.). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanujo.

Ĵaŭde

16.35-16.50 Bratislava, kiel marde.
21.45-21.55 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.86 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.25 m (11880 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs). P. (d-ro Baur).
23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1163 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavio.

Vendrede

18.30-19.00 Clermont-Ferrand, 90.4 Mcs (mod. frekv.). K. Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergovia, F-63000 Clermont-Ferrand, Francujo.
20.00-20.30 Pekino, 47.84 m (6270 kcs), 47.61 m (6300 kcs), 45.38 m (6610 kcs), 35.34 m (8490 kcs), 31.98 m (9380 kcs). I.
23.10-23.25 Warszawa, 1321 m (227 kcs), P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando. (ĉiun alternan vendredon).

Sabate

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
21.45-21.55 Bern, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).

RADIO ROMA. Notoj pri ondlongoj aperintaj en la maja kaj junia rubrikoj ne plu validas; samaj ondoj, kiel vintre, estas nun uzataj.

USONO. Radio-kurso estas dissendata de diversaj lokaj stacioj (vidu la junian rubrikon).

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Bratislava (ankaŭ en eksterlandlimaj regionoj), Clermont-Ferrand, Gdańsk (M.F.), Muritiba, Sabadell;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj ĉirkaŭmediteraneaj landoj: Bern (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Roma, Sofia, Valencia (en suda Eŭropo), Warszawa, Wien (aŭdebla en centra Eŭropo), Zagreb;

c) stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocoba-Guarulhos (en Brazilo kaj najbaraj landoj);

ĉ) stacio aŭdebla en Afriko: Bern (25,60 m, 25.25 m, 19.60 m, 19.44 m, 16.86 m, 13,94 m).

Tio estas nur ĝenerala skizo, variigebla laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera kondiĉo, lokaj cirkonstancoj diversspecaj.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 469, 1973-06-01

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Kehlet, s-ino E., Danlando
Kehlet, S., Danlando.
Kehlet, T., Danlando.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1973

277 B. Zachó, Danlando; 278 T. Schumacher, FR Germanujo. 279 F. Gialanzé, Italujo. 280 P. Ogwua-zor, Pollando. 281 Å. Ericson, 282 L. Holmlund, Svedujo. 283 L. Butz, 284 W.F. Day, 285 D.R. Evans, 286 R.M. Evans, 287 W.W. Glenny, 288 A.H. Hank, 289 H. Oatley, Usono.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1973-08-15 neniuj membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Aŭstralio: Winsome Greenhalgh, D kaj FD Brisbane.
Belgujo: Jo Haazen, FD Kalmthout. **Ĉeĥoslovakujo:** Włodzimierz Hebda, D Albrechtice, Karel Máca, D Bor, Vláda Hasala, D kaj FD Hodonín, Helena Nováková, D Kopřivnice, Jaroslav Adamec, FD Litomyšl, Helena Arnoštová, FD Prostějov, Alois Košťál, D Teplice vČ. **Francujo:** Georges Villeneuve, D kaj FD Saint-Cheron. **FR Germanujo:** Goar Engeländer, FD Bergisch Gladbach. **Hispanujo:** M. López Serna, D Alicante. **Hungarujo:** Gyula Kovács, FD Békéscsaba. **Japanujo:** Jukijoši Muramacu, FD Tōkyō. **Kubo:** Alfredo Caballero Rodríguez, FD La Habana. **Nederlando:** Jacob Tensen, FD Amsterdam; I.L.G. ten Wolde, D Arnhem. **Kanado:** Alma More, D Saanich; W.G. du Temple, FD Sidney. **Nov-Zelando:** Joyce A. Goodwin, FD Papakura.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1973, Unua Parto, pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj).

Belgujo: Mortsel. **Britujo:** Sheffield (D kaj FD Garraway). **Ĉeĥoslovakujo:** (FD Mičová). **Danlando:** Herlev, København (JD), Taastrup. **Francujo:** Bellerive-sur-Allier, Eaubonne, Lyon (FD radio amatora). **Japanujo:** Ginowan. **Nederlando:** Leeuwarden (FD Steffering). **Nov-Zelando:** Wellington (VD).

DONACOJ 1973 (Gld.)

Asocia kapitalo: Usono: heredaĵo Belle P. Clewe, 611,03. Sumo ĝisnuna: 1 227,93.

Fondaĵo Canuto: Nederlando: Institucio Hodler, 1 500,—; F. Zeiler, 30,—; ges-roj Bossong, 100,—. Sumo ĝisnuna: 2 123,40.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: Nederlando: Institucio Hodler, 300,—; S.M.: 20,—. Sumo ĝisnuna: 320,—.


Ĝenerala Kaso: Nederlando: H. Veenstra, 28,—. Svedujo: E. Carlén, 100,—; E. Schuldenfrei, 6,99. Ugando: David Birkett, 23,72. Anonima: 37,79. Sumo ĝisnuna: 1 083,07.

Kampanjo 100 x 100 (por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum 3 jaroj ekde 1971 po 100,— gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj):

Sumo donacita por 1971: 5 300,— gld.
Sumo donacita por 1972: 6 600,— gld.
Sumo ĝis nun por 1973: 3 901,12 gld.

Patrono A de TEJO 1973: 23 G. Spertini, Italujo.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.
Universala Esperanto-Asocio



Aŭgusto

- 1-14 Somera Esperanto-kolegio, Liberec, Ĉeĥos.
- 1-14 Int. Esp.-kurso, Pamporovo, Bulgarujo
- 5-12 Oficiala Postkongreso, Ateno, Grekujo
- 5-12 19a int. E-ferisemajno, Krommenie/Assendelft, Nederlando
- 5-15 Int. Tur. Renk.-festivalo, Szeged, Hung.
- 5-26 Studsemajnoj, Grésillon, Francujo
- 6-13 Postkongresa kultura feriado, Primošten, Ju.
- 6-25 Int. E-kursoj por instruistoj, Burgas, Bulg.
- 11-13 60a japana E-kongreso, Kameoka, Japan.
- 12-25 Int. Pedagogia E-seminario, Burgas, Bulg.
- 15-18 Int. turista postrenkontiĝo, Esztergom, Hungarujo
- 16-29 Int. E-kurso, Pamporovo, Bulgarujo
- 19-26 Esp. Ŝak-festivalo, Poděbrady, Ĉeĥosl.
- 26-9/9 Du kulturaj semajnoj, Grésillon, Francujo

Septembro

- 2-7 Studsemajno de int. fervojista kontraŭalkoh. asocio, Rapham, Norvegujo
- 2-8 Eŭropa ferio-semajno, Fürigen, Svislando
- 8-9 Amika renkontiĝo E., Dudince, Ĉeĥosl.
- 8-10 E-renkonto dum la foiro, Plovdiv, Bulgar.
- 15-22 44a itala kongreso de Esperanto, Trento
- 16-25 Ora E-feriado, Pamporovo, Bulgarujo
- 16-29 9a int. E-feriado, Miedzygórze, Pollando
- 29-30 5a kultura semajnfino, Renens, Svislando

Oktobero

- 1-7 6a pupteatra int. festivalo, Zagreb, Jugosl.
- 1-7 Intern. renkontiĝo de infanoj, Zagreb, Jug.

Decembro

- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Zamenhof-Tago (LLZ naskiĝis en 1859)
- 15 Tago de la Esperanto-Libro
- 28-2/1 2a Vintra E-feriado, Budapeŝto, Hungarujo
- 31 Kotizoj Universala Kongreso altiĝas

1974 Januaro

- 2-9 19a Aŭstralio E-kongreso, Brisbane
- 4-8 39a Kongreso de Nov-Zelanda E-Asocio

Februaro

- 1-6 Vintra E-semajno, Pamporovo, Bulgarujo

ANONCETOJ

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (t.e. 1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anonc(et)oj respondecas sole nur la anoncantoj.

PM-kolektantoj atentu! Filatelista Unuiĝo de Ruhra Esperantista Junularo sendos kontraŭ kvantoj da specialaj pm el Sovetunio samajn kvantojn da okcidentaj. Daŭre validas! F.U. de R.E.J., D-42 OB-11, Jägerstr. 27, FRG.

Signalon S.O.S. ankaŭ Dio komprenas, se faritan de preĝanto. Ĉu vi deziras nian libreton pri tiu temo? Esperanto-Misio, Box 7, Östansjö, S-694 02 Hallsberg 2, Svedujo.

Mi deziras korespondi kun eŭropaj gesamideanoj pri diversaj temoj sub la kondiĉo, ke la letero estu tajpita. Osaki-kazuo, 1077 Murosin-maĉi, Takamacuŝi, Japanujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo), turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63000 Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Korespondemuloj! Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian foton. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por senpaga aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!



▲ **Mezaĝa entuziasma esperantistino** deziras korespondi tutmonde diversteme. Tuj respondos. Anonco ĉiam valida. Veselina Baltaĝieva, Bjala-Rusensko, V. Levski 65, Bulgarujo.

En multaj landoj 2% de la enloĝantaro suferas pro la ne-infekta haŭtmalsano psorazio. La adreso de ĉiu landa asocio por suferantoj estas havebla de: The Psoriasis Association, 22 Billing Road, Northampton, Anglujo.

Sub-40-jara? Ĉiutage parolas Esperante? Sciigu adreson al: Pilger, Leekerhoek 26, Lelystad, Nederlando.

El la tuta mondo mi deziras ricevi globkraĵojn kiel interŝanĝon. Mi rekompencos laŭ la valoro. S-ro J. Climent, Pujadas, 460, Barcelona, Hispanujo.

Interŝanĝas ŝlosilulojn tutmonde s-ro Jesús Pérez Caballero, apartado 819, Las Palmas, Hispanujo. **Ĉu vi serĉas malnovan terminaron?** elĉerpitan bel-etraĵon? praverkon el la 19a jarcento? mankant-jarkolekton de malnova revuo? Demandu ĉe la Fotokopia Servo de UEA, kiu povas havigi al vi unuarangajn kserografiajn kopiojn el la Biblioteko Hodler. Prezo de unu kopio (= du paĝoj de mezformata libro): 0,30 gld. Sendokostoj 10%. Petante oferton, indiku klare la titolon kaj, laŭeble, la eldonjaron.

Filatelistoj! UEA povas liveri al vi kolekton de poŝtmarkoj de preskaŭ ĉiu ajn lando aŭ temo je du trioj de la efektiva kataloga prezo. Minimuma mendosumo: 10 guldenoj. Sendu vian mendon, prefere kun samtempa pago, al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Esperanto-ekspozicio 22-23 Sep. Bv. sendi al ni kuraĝigo-poŝtkartojn el la tuta mondo. Adreso: Esperanto-Ekspozicio ĉe "Peter Pan", Hollebeek 4, B-1630 Linkebeek, Belgujo.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK 5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skribu por nia bulteno.

Ĉu vi jam sendis vian karton al: La Tago de Turku, Box 66, SF-20100 Turku 10, Finnlando? Vi povas gajni belegan pupon. Pli detale en maja numero.

Deziras aĉeti, interŝanĝi nudfotojn kun foto-amatoroj; Leif Heilberg, P.O. Box 22159, San Francisco, Ca 94122, Usono.

Vendoprezo de "Hilelismo" 172 p. estas de nun \$3. Fondumo Esperanto.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Mi deziras ricevi poŝtkartojn kun katolikaj virgulinoj kaj Kristoj. Mi rekompencos laŭdezire. F-ino Rosa Armengol — C/. Real, s/n.— Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Alumet-etikedojn volas interŝanĝi G. Dorow, 36 Eldred Drive, Orpington, Kent, Anglujo.

Londona Klubo de Libroamantoj

proponas al
SOVETAJ ESPERANTISTOJ
amikan interŝanĝon:

NI BEZONAS lernilojn, grandajn vortarojn rusajn kaj angla-rusajn, verkojn de klasikuloj kaj furorlibrojn sovetajn.

NI REKOMPENCAS per egal-valoraj anglalingvaj libroj laŭ via deziro, per esperantaĵoj laŭ la katalogo de UEA k.s.

ADRESO:

Klubo de Libroamantoj, 140, Holland Park Avenue, London, W11 4UF, Britujo.

Amikeco trans limoj

Foto-poŝtkartoj por la Semajno de Internacia Amikeco kaj aliaj okazoj. Eld. UEA. 2,50 gld. (por Nederlando 2,90 gld.) por 10 ekzempleroj. Sendokostoj 10 procent.



BUKEDO

BUKEDO; 1-a kajero. Kolekto de 37 originale komponitaj E-o kantoj (muziknotoj kun tekstoj) por lernejoj, kongresoj kaj klubvesperoj. Komponisto: prof. V. Heimlich. Prezo: 3,— us.dol., inkluzive sendokostojn (per registrita poŝto). Pago: Bank Leumi le-Israel B.M. (Konto n-ro 5/51), Hof Hašaron Branch, Herzlia Pituaĥ, Israelo.

POR KUNE — FRATE — GLORE . . . KAJ ĈI-JARE

konkludi nian komunan bonfarecan iniciaton rilate al la "Pavilono Esperantista Frateco" por 48 hindaj, Madrasaj lepruloj, ni bezonas nur ĉirkaŭ 400 usonaj dolaroj. Favore al Pavilona Fonduso ni disdonos al monoferantoj (pogrande aŭ podetale) du belegajn esperantistajn kantojn: 1. *Donu al mi vian manon* — Teksto kaj melodio de Ramona van Dalsem. 2. *Himno de la eŭropaj federistoj* — Versoj kaj muziko de D-ro Alberto Menabene, traduko el itala lingvo de D-ro Luigi Minnaja. Bonvolu skribi al eldonanto: Rev. Peter Urbaitis S.D.B., Vytėnai, Lituani Don Bosco, Via Colonna, 2 (Tel. 940.507), I-00044 FRASCATI - Roma, Italujo.

Eseo pri politikaj, historiaj, juraj kaj filozofiaj aspektoj de milito. Temoj:

neŭtraleco, internaciismo, pacista edukado, mond-civitaneco, mondregistaro, internacia kodo, ktp. 212p., 15 cm. Prezo: 12,75 gld.



* * * * *

Aliaj verkoj ĵus eldonitaj de Argentina Esperanto-Instituto, C.C.58, Suc. 12, Buenos Aires (Argentino)

BONHUMORA INJEKTILO, 120 amuzaj anekdotoj kaj spritaj dialogoj, de Ergoto de Bonaero.

192p. 17 cm. Prezo: 12,75 gld.

LA FRIPONETO DE TORMES (pikareska novelo) 72 p. 17 cm. Prezo: 6,36 gld.

Mendu ilin ĉe UEA



"ĈIU ESPERANTISTO ĈIAM PORTU LA ESPERANTAN INSIGNON (NE MULTAJN, SED UNU)"
— Principaro de Frostavallen

Bikiniformatan eldonis UEA: diametro 8mm, pinglolo 43 mm; verda, filikeca stelo sur blanka fono. Prezo: 1,62 gld. (por Nederlando 1,85) + sendokostoj 10%.

ESPERANTA INFLUGRUPO BEZONAS VIN!

CELOJ: Instigi kaj helpi la fondon kaj la efektivan utiligon de influgrupaj organizoj por Esperanto tra la mondo.

Instigi kaj helpi premi organizojn de la Eŭropa Ekonomia Komunumo akcepti Esperanton kiel oficialan lingvon.

Esperanto influgrupo proponas helpon, konsilon kaj praktikan kunlaboradon por krei influgrupon en via lando.

Se jam ekzistas influgrupo aŭ simila organizaĵo en via lando, Esperanta influgrupo kunordigos la agadojn de via grupo en aliaj landoj, kiam tio estas konsilinda. Bonvolu sendi detalojn de influgrupa aktiveco de via lando al la suba adreso, por ke plenaj informoj de agadoj ĉie en la mondo estu haveblaj de unu loko.

Organizanto: Ron Coverson, Esperanta Influgrupo, 601 Duncan House, Dolphin Square, LONDON SW1, Britujo.

Komitato de la Brita Esperantista Asocio
por Eŭropo kaj Parlamentoj.

El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro £0,90 Kan. \$2,20 6,— gld.
2 jaroj £1,35 Kan. \$3,30 9,— gld.
3 jaroj £1,80 Kan. \$4,40 12,— gld.

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj
aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-
Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



PROFITU, SINJORINOJ!

Nun dumtempe somerrabaton de 20%

Miloj da mallongaj kaj longaj

PELTMANTELOJ

peltaj ĉapeloj kaj kolumoj, kolekto 1973.

Aĉeti nun kaj pagi en la vintro.

Ni senpage retenos por vi.

Trijara garantio.

Laŭdezire tre flekseblaj kreditkondiĉoj.

La plej granda kaj plej malmultekosta peltvendejo
de Nederlando.

DE BONTKONING

Hoogstraat 97, Rotterdam-C, tel. (010) 117.117.

Granda aŭtoparkejo. Por aĉetantoj: repago de kostoj
de vojaĝo en Nederlando: trajno, aŭtobuso, benzino.

"Ni volas per KONTAKTO doni al TEJO karakteron, kaj montri ke ĝi ja ne estas inerta kaj senviva organizo. Ni celas ne simple liveri al vi en KONTAKTO nur ankoraŭ alian novaĵfoliaron aŭ anoncaron, sed veran gazeton, kies enhavo ne pritraktu simple Esperanton, sed ankaŭ tiujn problemojn, kulturajn kaj sociajn, kiuj tuŝas la junularon, kaj tiujn apartajn interesojn kiujn havas gejunuloj." Julio 1963

"Kvankam aĝa preskaŭ cent jarojn — ekologio — la scienco pri la homa naturmedio nur lastatempe, efektive nur dum la pasinta jaro, transformiĝis el kabineta scienco pri prognozoj en tutplanedan timigilon." Julio 1973

KONTAKTO ankoraŭ ne aĝas 100 jarojn, sed dum la 10 jaroj inter tiuj du deklaroj ĝi transformiĝis el homunkulo kun neprognozeblaj vivoŝancoj al bubo ne plu ignorebla.

La ĉefa temo de la jubilea numero de KONTAKTO estas

KIEN LA GLOBO?

El la enhavo:

- Ekologio — kiam komenciĝos la fino?
- Inventaro de ekologiaj problemoj
- Rejno — la eŭrokloako
- Japanoj kaj la ruboj
- Ĉu supersonaj flugoj detruos la stratosferon?
- La kria kontrasto inter armiloj kaj evoluhelpo
- La konebla morgaŭa mondo: Homoj el retorto
- Ne helpo — sed bona negoco

Aliaj kontribuajoj: Panteono de TEJO (Sifo — ĉina revolucio kaj pioniro de Esperanto); Ciganoj vekiĝas; Mozaiko.

Eldonas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo,
Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Abonkotizo: 8,— gld. (4 n-roj). Petu specimenon!

Ĉu vi konas la kultur-revuon

NORDA PRISMO?

Se ne; petu provnumeron!

Se jes; abonnu kaj igu aboni ĝin!

Jarkolekto: 25 d. kronoj.

Mendo: P. B. 952, DK 2400 NV.

Pago: Per ĝirkonto 905 55, DK.

aŭ per Landmandsbanken, DK 2900.

1973

Dek-oka jaro

SCIENCA REVUO

JEN KELKAJ SPECIMENAJ

TITOLOJ EL LA ENHAVO:

Vol. 21

N-ro 1

V.Setälä: Pri la artikolo en Esperanto
F.García Blázquez: Realaj kaj fikтивaj fortoj
E.Kääriäinen: Pri la formo kaj grandeco de la terglobo
A.I.Pravda: Pri kelkaj kontraŭvibradaj rimedoj

N-ro 2

A.P.Thewrewk: Dante kaj la natursciencoj
D.J.Martinov: Duoblaj steloj kaj interna stelstrukturo
V.Peevski: Nuntempaj metodoj por kreado de planoj kaj mapoj
M.Kossakowski: Triveturlarĝaj aŭtoŝoseoj

N-ro 3

W.A.Verloren v. Themaat: La duapersonaj formoj de la latina verbo
S.Simeonov: Nuntempa scienca informado kaj dokumentado
V.Kulaga, J. Talovskaja, V.Saponickij: Al morfologia esploro de mastocitoj dum alergiaz vaskulitoj de haŭto
J.O.Matvijišin: Matematikaj sciencoj laŭ arkeologiaj materialoj

N-ro 4/5 (filologia numero)

J.Adcock: Esperanta prononco
S.Guĝev: Aŭdozonoj en muziko kaj en lingvistiko
A.D.Atanasov: La slavaj lingvoj kaj la slava skribo
I.Zulfikary: La tjurkaj lingvoj

N-ro 6

E.J.Görllich: Aŭstra literaturo kiel ligilo inter la popoloj
F.Pluhar: Ensorbaj aparatoj por silicia kvarfluorido en kemia industrio
Bogatyrev, Matvijišin: La redukteco de malfirme nelinearaj diferencialaj ekvacioj en Banaĥ-spaco
K.J.Young: Elektra rapid-ŝanĝo por gramofonoj kaj magnetofonoj

Vol. 22

N-ro 1/2

Kavka-Pumpr: Poŝatlaso de la mondo
H.D.Maas: Pri strategio de aŭtomata lingvo-tradukado
S.K.Hvorostin: Cara cenzuro kaj Esperanto
J.Dagys: Pri fiziologio de plantoj kaj agrikulturo

N-ro 3

E.Sonnenfeld: De la Prafundamento ĝis la Bulonja fundamento
Lewin-Nomra: La Drew-monumento en Uto, Japanio
M.T.Popov: Pri taĥiona fotono
M.Bartovska: La teksokombilo

N-ro 4 (filologia numero)

R.Haupenthal: Esenco kaj celoj de interlingvistiko
A.Albault: Translitera cirila alfabeto
S.Guĝev: Spuroj de antikvaj kulturoj en la bulgara folkloro
W.A.Verloren v. Themaat: Fleksio, derivado kaj paradigma morfologio

N-ro 5

I.Focht: Fungoj de jugoslavia marbordo
W.E.Klimek: Matematika modelo de demonomerigado per ŝpruc-metodo dum kontinua produkta procezo de polikarpolaktamo
Talanov kaj Semenov: La demandoj de logika priskribo de la arkitekturaj grafikaj strukturoj kaj ilia enkonduko al EKCM

N-ro 6

A.Albault: Unika konflikto inter niaj du Fundamentoj
B.V.Tokarev: Klasifiko de ĥemiaj transformiĝoj surbaze de diskretaj karakterizaĵoj de atomoj
B.Popoviĉ: Kalkulado de la moviĝo ĉirkaŭ aksosimetria planedo sen la sekulaj membroj

Vol. 23

N-ro 1

J.Dagys: La plantoj de la Balta marbordo
Tronov kaj Gonĉarov: Kompleksiĝo de ftala anhidrido kun rodanidoj de univalentaj katjonoj en acetono
W.de Smet: La nomoj de la cetacoj
J.Chvosta: Kontribuo de Ŝumiroj al la homara civilizo

N-ro 2

A.Heck: Aŭtomata dissendado de la sciencaj informoj
B.Popoviĉ: Komuna influo de la gravita forto kaj de la rotacio al formoj de ĉiel-korpaj sistemoj
V.Ja.Semke: Pri partopreno de somatogena faktoro en dinamiko de histeriaj malordigoj
Sirij kaj Matvijišin: Al la precizdemando de glatuma metodo de lokaj singularaĵoj kaj malfacilaĵoj rilate al ĝia uzado al solvo de la problemoj el profila filtrado kun helpo de ECKM

N-ro 3

R.Rychly: La grupo por kristaligado en la eŭropa federacio de kemiingeneriaj sciencoj
C.Støp-Bowitz: Zoologia nomenklaturado
V.Ja.Saponickij: Pri limfocit-ecoj de limfoglandoj
M.Halvelik: Skatolo de Pandora kaj ĉevalo de Trojo

N-ro 4

Z.Pluhar: Etkvantaj elementoj en moderna ĥemio de sterkoj
B.V.Tokarev: Organikaj funkcioj
J.Chvosta: Eksterteraj civilizoj sur la Tero
K.J.Young: Analogeco kaj dualeco

N-ro 5/6

Y.Väisälä: Dua luno de Tero
Väisälä kaj Oterma: Evoluo de astronomiaj objektivoj kaj teleskopspeguloj
B.Popoviĉ: Generala solvo por la ekvacio de perturboj en rektangulaj koordinatoj
A.Heck: Evoluo kaj masinterŝanĝo en duoblaj steloj

Vol. 24

N-ro 1

W.M.A.de Smet: Rimarkinda kazo de nenormala dispozicio de sangovazo
C.L.Melo: Kial patrino kaj feto ne rifuzas unu la alian?
M.F.Figueroa: Degustumado, mezurado de sensaj laĝetoj, generataj de gustoj
C.Iwaniszewska: Nikolao Kopernik — Torunano

N-ro 2/3 (filologia numero)

I.Szerdahelyi: Kelkaj gnoseologiaj problemoj de scienca esploro de Esperanto
A.Albault: Du literoj — multaj problemoj

La amplekso ĉiujare kreskas: pasintjare 228 paĝoj de granda formato (B-5) — krom tio senpagaj numeroj de BULTENO de ISAE — ĉio tre malmultekosta!

MENDEBLA PER LA LIBROSERVO DE UEA

50 steloj pere de la delegita reto de Internacia Scienca Asocio Esperantista (La listo de la delegitoj troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo de la revuo)

56 steloj (14 nederl. guldenoj, 5 usonaj dolaroj) ekster la delegita reto de ISAE

PLURJARA ABONO APARTE FAVORA:

abono por 5 jaroj validas 6 jarojn
abono por 8 jaroj validas 10 jarojn
abono por 15 jaroj validas 20 jarojn

APARTA TARIFO POR LA DUMVIVA ABONO